Jarkolekto 16 Trimonata N-ro 2, 1986

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

REDAKTA KOMITATO

Bociort, I. (R)
Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Kiselman, K. (S)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)
(redaktisto)

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK H-1364 Budapest, Pf. 107

Presado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antwerpen

Enhavo

LERNEJA LINGVOPOLITIKO – Szerdahelyi I., *La morgaŭo de la fremdlingva instruado* 1

DISKUT-FORUMO – Daŝgupto, P. *La neintereseco de Esperanto al la lingvosciencistoj* 10

INSTRUPRAKTIKO – *Cseh-metodo en nova/profesia vesto* (IEI) 15

ILEI-KONFERENCO la XXa – Szent Györgyi A., *Psalmus humanus* – (I. Szabó) 17

Kadrotemo: *Pacon!* (La redaktinto) 19

Ferenc, Franz, François Liszt? (I. László) 26

La Konferencejo kaj la konferenca urbo 28

La donaco de Loveno (VHZS) 32

Superrigardo de la instrusistemo en Belgio. – Marc Demonty 34

Sugestoj de la Vicprezidanto 38

La detala programo de la XXa 39

AKTUALAĴOJ – *okazintaĵoj – diversaĵoj – informaĵoj – sciindaĵoj – anoncoj* 41

LIBROBRETO 49

Jarkolekto 16 **junio 1986** **N-ro 2, 1986**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas trifoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj eĉ rekomendataj kune kun fontindiko.

Lerneja Lingvopolitiko

LA MORGAŬO DE LA FREMD-LINGVA INSTRUADO

István SZERDAHELYI

Dum kvin jaroj en Hungario la Akademia-Ministeria Komuna Labor-komisiono antaŭpreparis la reformon de la fremd-lingva instruado. La aŭtoro de la ĉi-suba artikolo estis membro de tiu Labor-komisiono. Ĉi tiu artikolo estas lia propono, farita en la Komisiono kaj aperinta Hungar-lingve en la oficiala organo de la Kleriga Ministerio "*Köznevelés*"/'Publika edukado'/n-ro 34, pĝ. 6-7., la 21-an de oktobro 1977. La sekvo de tiu propono estis, ke Esperanto eniris oficiale en la mezlernejan sistemon.

Ni publikigas ĉi tiun artikolon, ĉar ĝi eble povas servi kiel sekvinda aŭ eble evitinda modelo ankaŭ por aliaj landoj. Ĝia originala titolo estis "Idegen nyelvi oktatásunk holnapja".

Eble ne ekzistas eĉ unu ŝtato, en kies instruada sistemo mankas fremdaj lingvoj. Des pli granda estas la signifo de la posedo de fremdlingvo, ju pli izolita, lingve senparenca estas la popolo. Samtempe, ju pli granda estas la distanco inter la gepatra kaj la instruata lingvo, des pli problema estas la instruado/studado, des pli multe da tempo kaj energio estas necesa, kaj des pli malmulte sukceso estas atendebla. Laŭ tiu vidpunkto eblas, ke en Eŭropo situacio de Hungaroj estas la plej malavantaĝa. Ni eĉ ne havas eblecon lerni el la spertoj de aliaj: ni devas mem elpensi, plani kaj solvi ĉion. Ni faris tion ankaŭ ĝis nun, kaj ni devos fari tion ankaŭ en la futuro: morgaŭ, tio estas ĉe la enkonduko de la proksimtempa studprograma reformo – kaj postmorgaŭ.

okaze de la studplanreformo de la miljarturno. (Ni jam duone estas en la morgaŭo, ni povas kolekti spertojn nur por la postmorgaŭo.)

La problemoj

Por Hungaroj la problemon prezentas la konfrontado de du lingvoj kun tute malsimilaj sistemoj: la gepatra lingvo estas Finn-Ugra, la instruata – Hind-Eŭropa. Ĉar ĉiu fremda lingvo, instruata en nia lerneja sistemo estas Hind-Eŭropa, la problemo reduktiĝas al la konflikto *Finn-Ugra – Hind-Eŭropa*. Sekve: la unua ĝenerala lingvo-didaktika modelo estus: la kompara-konfronta modelo de tiuj ĉi du lingvo-tipoj.

Tiu ĉi modelo povus servi kiel bazo por nia agado sur ĉiu nivelo: ~~en la preparado de la instruistoj, en nia agado sur ĉiu nivelo~~ en la preparado de la instruistoj, en la programado de stud-materialo kaj en la ĝenerala lingvo-metodologio, en la instru-eduka praktiko.

Samtempe, la komuna bazo certigis la striktan unuecon de ĉi tiuj strikte interrilataj, sed ankoraŭ ne sufiĉe akordigitaj tri teritorioj. Kelkaj ekzemploj pri ĉi tiu ebleco.

En la preparado por profesoreco (ni parolu ĉi-foje nur pri la metodologio de unuopaj lingvoj) estas multaj trakovraĵoj kaj kontraŭdiroj. Ekzemple, studento de Angla, Rusa kaj Esperanto deklaris, ke en la metodologioj kvazaŭ 70 procentoj de la studmaterialo estas la sama en la tri lingvoj, kaj, aliflanke, en unu lingvo li lernas ĝuste la kontraŭon de tio, kion li aŭdis en la studhoro de la alia lingvo. La instruado de la teorio de metodologio komenciĝas ĝenerale per la evoluadhistorio de la metodologiaj konceptoj. Unuj startas de Donatus, aliaj de Gouin; la demonstrad-manieroj, la studhorkonstruo, la ekzercoformoj, la uzado de instruteknologio, la eksterstudhora laboro, ktp. – estas la samaj. Estus racie instrui en la kadro de aplikata lingvistiko ĝeneralan metodologion de la fremdlingvo-instruado surbaze de la ĵus menciita ĝenerala modelo (ĉi tio estus tiuj kvazaŭa 70 procentoj de la materialo, kio estas la sama en la metodologio de la diversaj lingvoj) kaj instrui aparte (konsidere la praktikon) la specialajn problemojn de la konkreta lingvo sub la titolo: metodologio de la instruado de la Rusa,

Angla, Germana ktp. lingvoj. Tiel ĉesus la trakovraĵoj, la kontraŭdiroj, ĉiu studento de fremdaj lingvoj ricevus bazon, kio estas komuna, pli firma, konvena al la hodiaŭa stato de la scienco.

En la kadroj de ĉi tiu objekto havus lokon temoj, hodiaŭ ankoraŭ neglektataj, kiel ekz. la studmaterial-planado kaj la lernolibro-metodologio, la interfero kaj transfer-esploro, la instruteknologio, la studmaterial-programado, la programata instruado ktp.

Ankaŭ en la studmaterial-planado portus bonefikan ŝanĝon la unuiga influo de la ĝenerala bazmodelo. Krom la Rusa lingvo ĉiuj aliaj Hind-Eŭropaj lingvoj estas instruataj inter la samaj cirkonstancoj en la klasoj kun ĝenerala studplano, tial ankaŭ ĉi tie estas ĝeneralaj elementoj, kiuj koncernas egale ĉiun instruatan lingvon. ankaŭ la nombro de la instruataj leksikaj unuoj povus esti pli-malpli la sama (ne povus okazi, ekz., ke la unua libro de unu lingvo enhavas 260, tiu de la alia 700 leksikajn unuojn!). Ankaŭ en la tematiko estas senmotiva la tro granda diferenco, ja la studplanaj tematikoj estas preskaŭ tute la samaj. Estas imagebla, eĉ proponebla abstrakta ŝablono (modelita laŭ la koncept-klasifikaj filozofiaj lingvoj) kio estus leksika formularo de la tuta instruada ciklo. Sama ĝenerala skeleto povus esti konstruata ankaŭ por la gramatika materialo. Poste, la konkretigado okazus laŭ lingvoj, konsiderante la fizionomion de la lingvo. Por ĉi tio estas necesaj pli novaj dokumentoj: devas esti precize konata, kiuj estas la problemoj de la Hungara lernanto en la konkreta lingvo, t.e. necesas la erargramatiko. Eĉ hodiaŭ ni ne havas science analizitan eksperimentan materialon eĉ pri la instruado de la Rusa lingvo.

La fremda lingvo, kiel lerneja studobjekto, estas lingva segmento ĉicele modelita. Ĉi tiu modelado havas siajn striktajn leĝojn kaj kondiĉojn. La nekono de la leĝoj, la manko de la kondiĉoj ne ebligas la konstruadon de ĝusta modelo.

La sama validas rilate la *instru-edukan praktikon* kion ni menciis ĉe la antaŭaj punktoj. Ne ekzistas fremda lingvo (eble escepte la Latinon) je kiu ne estus valida la principo de la maksimuma fremdlingveco de la

studhoro, la valoro de fremdlingva studhoro estas konstatebla el la rilato instruisto – lernanto/gepatra lingvo – fremda lingvo.

	Gepatra lingvo	Fremda lingvo
Lernanto		
Instruisto		

En la malplenajn rubrikojn oni enskribu tion, ke dum la studhoro kiom da minutoj parolis la instruisto kaj la lernantoj fremdlingve respektive en la gepatra lingvo. La plej valora studhoro estas tiu, dum kiu la lernantoj parolas plej multe fremdlingve. La bona lingvoinstruisto estas tiu, kies lernantoj kuraĝas demandi fremdlingve, estas eĉ pli bona tiu, kiun la lernantoj kuraĝas alparoli fremdlingve en la koridoro aŭ en la korto, sed la plej bona instruisto estas tiu, kiu povas atingi, ke la lernantoj parolu fremdlingve ankaŭ inter si, ekster la lernejo. Ĉio ĉi estas jam ne plu instrua, sed eduka problemo.

La bazdokumentoj de la sekva studplanreformo estas jam pretaj. Ilia karaktero indikas ne tiome komencon de nova, pli sukcesa epoko, sed plie la finon de la antaŭa. Ĉi tio estas lasta provado en la reformserio, kio, malgraŭ ĉiu bonvolo, ne plenumas la atenditajn esperojn.

Ankaŭ post reformoj ne fariĝis esence pli efika, pli sukcesa nia fremdlingva instruado. Nek la mekanikizado, nek la studmaterialredukto solvis la problemon: la malbono povas esti forigita nur likvidante ŝiajn realajn kaŭzojn, la surfaca kuracado ne sufiĉas.

La perspektiva reformprojekto de la miljarturno sondas jam pli profunden, ĝi apogas sin sur la rezultoj de sciencaj eksperimentoj: ĝi estas pli pripensita (Opinideklaroj kaj proponoj de la Hungara Scienca Akademio al la perspektiva kulturo kaj al la evoluigo de la lerneja edukad-agado. Bp 1976). Ankaŭ tiu ĉi projekto enhavas kelkajn tiajn elementojn, kies ĝusteco estas forte diskutinda, eĉ kelkaj el inter ili povas danĝerigi la sukceson de la tuta reformo.

Kiujn du fremdajn lingvojn?

Ne eblas paroli pri la fremdlingvoinstruado nekonsiderante la instruadon de la gepatra lingvo. Ambaŭ instruadaj kampoj apartenas al la sama "kultura bloko", al la lingva-komunika edukado. Sed interne de la bloko apenaŭ estas diskutebla la prioritato de la instruado de la gepatra lingvo: inter ĉi 2 instruaj kampoj estas sub- kaj superorditaj rilatoj. Tial estas dubinda tiu tasko, kiun la propono (pĝ. 39) destinas al la gepatra lingvo, ke ĝi havu la rolon kiun la iama instruado de Latino havis, ke ĝi kreu la gramatikan bazon de la instruado de fremdaj lingvoj. Ĉu eblas ŝarĝi la instruadon de nia gepatra lingvo per ĉi tiu plustasko, kiam ankaŭ la instruado de la gepatralingva kultureco de niaj lernantoj bezonas signifan plibonigon?

Ne estas ĝuste konsideri la fremdajn lingvojn "mondlingvoj". Ĉiu fremda lingvo estas nacia lingvo, kio reprezentas konkretan kulturon, estas ĝia peranto. Eĉ ne unu estas neŭtra. Kiam ni planas longdistancan reformon, ni ne povas deiri nur el la hodiaŭa situacio. Devas esti atentataj la prognozaj signaloj, kiuj indikas la futuran situacion de la grandtrafikaj lingvoj. Laŭ la *World Bank Atlas* (Washington, 1974) ĝis 1986 la Hispana lingvo atingas la disvastiĝitecon de la Angla, kaj ĝis 2000 superos ĝin. DÉCSY GYULA opinias en lia elstara, en ĉi tiu temo unika verko, ke ĝis 2000 solviĝos la problemo de la komuna pera lingvo en Eŭropo, kaj ĉi tiu lingvo povas esti la venkinto de la Angla-Esperanto konkurso. Ankaŭ ĉi tiuj ekzemploj pruvas, ke okazas plie laŭ kutimo kaj ne surbaze de logika konsidero, ke la rondo de la dua lingvo estas limigita je 3 lingvoj (Angla, Germana, Franca). Ankaŭ la motivo de la propono kio koncernas la devigan instruadon de du fremdaj lingvoj en la elementa lernejo ne estas akceptinda: "La dua fremda lingvo igas la lingvostudon pli interesa kaj bunta, motivas pli bone, kaj pozitive influas la kulturecon de la gepatra lingvo." Se la elementa lernejo povas igi alproprigita unu fremdan lingvon sur parolnivelo en proporcio de la disponebla studhor-nombro, tiam ĝi plenumas sian destinon. Estas sciate, ke ĝis nun ni ne sukcesis atingi tion. Ne estas verŝa-

jne, ke la enkonduko de la dua lingvo povas solvi la nepre solvendan problemon. Ĝi nek interesigos, nek variigos la lingvostudon (nek de la gepatra, nek de la Rusa lingvo) sed kunportos novan ŝarĝon, novan problem-amason.

Ankaŭ la motivado estas duba. Se la lernanto facile kaj kun plezuro akiris sukceson en la unua fremda lingvo, tio influas verŝajne pozitive la sekvan fremdan lingvon. Se en la unua fremda lingvo la lernanto akiris kontraŭajn spertojn, tio povas havi duoblan konsekvencon. La antaŭa malsukceso anticipe fortimigas lin de la dua provado. Aŭ ĝuste male: li opinias, ke eble la dua provado estos la sukcesa kaj tial povas facile okazi (tion montras certaj mezlernejaj spertoj), ke li neglektas la lernadon de la unua lingvo pro la dua. Ne estas unusence klarigita la efekto kion la fremda lingvo havas sur la gepatra lingvo. Tio povas esti pozitiva, sed ankaŭ negativa. ADY ENDRE skribis la 4-an de septembro 1906 la sekvajn alineojn en la "Peŝta Taglibro" (Pesti Napló): "Post kvindek jaroj la Hungara infano devas naskiĝi sciante paroli almenaŭ Angle, Germane, France aŭ estos granda domaĝo! Krome, li tuj devas scii almenaŭ unu Slavan lingvon. Verŝajne li devas ellerni ankaŭ la Japanan. Mi mencias, ke la Angla dialekto de la Unuiĝintaj Ŝtatoj ankaŭ devas esti nepre en lia sango. La Italoj instruis la literojn al ni, kaj kun ili ni havos ankoraŭ multajn problemojn. Ankaŭ ilia lingvo necesas... Vere, la Hungara infano de la futuro havos apenaŭ tempon ellerni ankaŭ la Hungaran. Kaj ĉio ĉi ne estas ŝerco, sed la plej serioza realaĵo..."

Niaj ĝisnunaj spertoj pruvas, ke semajne tri studhoroj ne sufiĉas por alproprigi lingvon parolnivele. Ankaŭ tio estas problemo, de kie ni forprenu la plushorojn (aŭ kiom da horoj ni aldonu al la jam tro alta nombro de studhoroj). Ĉi tiuj problemoj daŭras ankaŭ tiam, se la instruado de la Rusa estos komencota du jarojn pli frue.

La demando de la "unua fremda lingvo"

SZÉPE GYÖRGY skribas en sia artikolo titolita "Lingvokono kaj moderna kultureco": *"La ellerno de la unua fremda lingvo havas duoblan taskon: ni lernas konkretan lingvon, kaj samtempe ankaŭ tion, kiel oni devas lerni fremdan lingvon... La unua fremdan lingvon oni devas lerni frue: se tio estas komencata pli poste ol la 10-a jaraĝo, tiam tio estas ĉiemaniere riska... La dua lingvo profitas la plej multon el la bona unua lingva (unua fremdlingva) fundamentado..."*

Esperanto estas formaligita lingvo: modelo farita por instruado – lernado. Ĝi estas samtempe sinteza mikromodelo de la Hind-Eŭropaj lingvoj: ĉiuj Hind-Eŭropaj lingvaj fizionomioj estas simpligite troveblaj en ĝi. Ĝi estas ideala, kiel fremdlingva preparado. Multaj eksperimentoj certigas, ke ĝi altigas la efikogradon de la dua fremdlingvo bazita sur ĝi 30-50-procente. Se ĝi krome nenion donus, ĉi tiu sola motivo estus sufiĉa por enkonduki ĝin.

Esperanto ne estas sole baziga helpilo, sed ĝi mem estas jam viva lingvo, uzata en larĝaj rondoj. Hodiaŭ ĝi havas jam pli multe da aplikebleco en la lerneja praktiko ol kiu ajn alia fremdlingvo (larĝa koresponda reto, bone organizita lernanta interŝanĝmovado, konstantaj kampadaj eblecoj, ktp.).

Pro ĝia logikeco kaj reguleco ĝi estas facile alproprigebla. La lernantoj ne bezonas ekstran helpon (korepetiton, pagitan hejman instruiston, ktp.), tial ĝi ekkreas ankaŭ la demokratismon de la lingvostudo. La lernantoj estas ege aktivaj, ili ne konas ekparol-inhibon en la fremda lingvo. Ĉi tiun naturecon ili transferas ankaŭ al la sekvanta fremdlingvo. Sekve de ĝia internacieco kaj "neŭtraleco" ĝi estas la sola lingvo, per kio la pedagogiaj celoj pretendataj de la instruado de fremdlingvo estas atingeblaj.

Pro ĝia facileco ĝi estus enkondukebla ankaŭ en institucioj, (industriaj lernejoj, stenografiaj-tajpistaj lernejoj, sanitaraj faklernejoj) kie, tre malĝuste, ĝis nun ne estas fremdlingva instruado.

Ankaŭ la preparo de instruistoj estas simple solvebla. Ni havas pozi-

tivajn spertojn pri tio, ke la fakpedagoga kvalifiko akirita en la porinstruista instituto estas konvena por bonrezulta instruo de la lingvo (ankaŭ en klasoj kun speciala studplano). Ĉi tiaj eksperimentoj estis (kaj parte estas) farataj en Esztergom, Sárospatak, Szombathely kaj Eger.

La instruado de Esperanto havas tradiciojn en niajn lernejoj. La etato de la lernantoj kreskas. Ĉi tion demonstras la suba kompara tabelo:

	1973/74	1976/77
Bazlernejo:	800	1 696
Mezlernejo:	132	165
Universitato/altlernejo:	89	116
Entute:	1 021	1 977

Laŭ ĝia bazlerneja lernantetato Esperanto estas la tria post la Rusa kaj Germana. Ĉi tiu indiko estas des pli konsiderinda, ĉar ĝi estas rezulto de individua iniciato kaj volonta laboro sen kiu ajn subteno.

Propono de Bárczi Géza

La diversaj provadoj pruvas, ke irante sur la ĝis nuna vojo, la aktuala situacio ne estas radikale ŝanĝebla. Ni devus starti sur novaj, ĝis nun ne provitaj vojoj. En nia artikolo ni proponis tian aŭdacan eksperimenton. Sed eble, kaj certe ekzistas multaj aliaj elpensaĵoj. Mi opinias, ke ne malutilus demandi pri tio la plej kompetentajn: la pedagogojn, kiuj instruas fremdajn lingvojn. El ĉi tiu artikolo estas ekkoneblaj du planoj. Estos, kiu akceptos la unuan aŭ la duan, kaj certe estos, kiu proponos trian. La signifo de la afero indas, ke ni okupiĝas pri ĝi. Povas esti diversaj proponoj: ni povas nek forĵeti, nek akcepti ilin, ĝis kiam ni eksperimente pruvos ke ili estas ĝustaj aŭ malĝustaj. Feliĉe, ni ankoraŭ havas tempon por fari tiajn eksperimentojn (kun konvena preparado kaj direktado). Ni devas nur komenci.

Ĉi tiuj pensoj estas nek novaj, nek originalaj. Antaŭ pli ol dek jaroj BÁRCZI GÉZA jam formulis la samon en la forumo de la revuo "Publika Edukado" (Köznevelés, 1966/23). Liaj vortoj restis sen eĥo, estas forgesitaj. Ni citu du pensojn el tiu artikolo. La unua temas pri la praktika utilo de Esperanto: "*... kvankam la batalo, kio ĝis nun portis multajn sukcesojn, ankoraŭ tute ne estas finita, Esperanto jam abunde prezentas tiujn avantaĝojn, kiujn la kono de alia lingvo povas doni...*" (Ĉi tie sekvas la konkreta denombrado de la avantaĝoj).

La dua penso respondas al la sekva demando: Kiun helpon donas Esperanto al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj? La respondo de BÁRCZI GÉZA: "*Estas konate, ke la ellerno de la unua fremda lingvo estas ĝenerale malfacila tasko; ellerni la sekvajn estas jam pli facile, ĉar kreskas la elasteco de la lingva rutino. Esperanto, kiu minimumigas la komencajn malfacilaĵojn, estas elstara enkonduko ankaŭ al aliaj lingvoj. Tion atestas multnombraj interesaj kaj bonrezultaj eksperimentoj kaj eksterlande kaj en Hungario. Tiuj lernantoj, ekzemple, kiuj neniel povis ellerni la Rusan, kvankam elstara pedagogo ilin gvidis, post kelkaj monatoj de Esperanto-lernado montris abruptan progreson en la Rusa. La sperto estas la sama rilate ankaŭ aliajn lingvojn. Sekve, se ni opinias, ke pro pluraj kaŭzoj estas dezirinde, ke, krom la gepatra lingvo, ĉiu homo posedu duan lingvon, kio ebligas la komunikiĝon kun la eksterlando, la pli profundan ekkonon de la homoj kaj intelektaj valoroj, ĉi tiu lingvo povas esti por la vastaj tavoloj de la socio, sed ankaŭ por ĉiu, nur Esperanto.*"

BÁRCZI GÉZA konis la vivon de la lingvo, estis sperta en la mondo de la lingvoj, kaj profunde amis sian gepatran lingvon.

Tradukis Katalin KISFALUDY
3-a-jara studentino pri Angla-Germana-Esperanto lingvoj
Universitato ELTE-Budapeŝto

Diskut-materialo al la temo: "Ĝeneralaj lingvo- kaj lernejpolitikaj tendencoj" antaŭvidita por lundo, la 14-a de julio, inter la 14.30 kaj 16-a horo.

Diskut-forumo

LA NEINTERESECO DE ESPERANTO AL LINGVOSCIENCISTOJ

Probal DASGUPTO

Esperantistoj, kiuj iel ajn intertraktis kun profesiaj lingvo-sciencistoj, observis, ke tiujn ĉi Esperanto simple ne interesas. Se oni rigardas al la ĝenerala evoluo de la lingvo-scienca sinteno al Esperanto dum la 92 jaroj post 1887[1], oni notas sisteman malkreskon de interesiĝo.

Oni povas plendi. Eble plej elokvente tion faras... WARINGHIEN en sia verko *Lingvo kaj Vivo*...

Oni povas agi. Ĝis nun plej efike faris tion SZERDAHELYI kaj WELLS...

Oni povas demandi [A] kial entute la lingvo-scienca malinteresiĝo pri Esperanto, kaj [B] kial la des pli intensa malinteresiĝo, ju pli la scienco progresas...

Mi certe ne dividas la senton de multaj esperantistoj, ke la respondoj al [A] kaj [B], kio ajn ili estu, apartenas pli al la kategorio de nepensmeritaj faktoj de la vivo ol al tiu de solvendaj problemoj...

Sufiĉe diversa aro da motivoj elektigas science studi studotajn lingvojn. La angla estas multe analizata, ĉar relative multaj anglalingvanoj aŭ tiulingvemuloj, pro evidentaj sociaj kaj nombraj kialoj, envenas en la lingvo-sciencon. La sanskrita estas profunde pristudata, ĉar vivas seninterrompa tradicio studi ĝin kaj ĝi estas jam multe pli pridemandita, ol preskaŭ iu ajn alia homa lingvo; ĝuste tiu multeco da demandoj jam faritaj, kaj la modera klareco de la respondoj trovitaj, faciligas la procezon de pludemandado surbaze de la ekzistanta komprenaro. La japana ricevas klerulan atenton parte pri tiaj faktoroj, kiaj la ĵus menciitaj, kaj parte pro tio, ke la japanoj estas ekonomie kaj strategie unu el la plej gravaj neokcidentaj nacioj por okcidentanoj, kio gravigas ankaŭ ilian lingvon.

1. la artikolo estis verkita en 1979

Krom ĉi tiaj faktoroj, kompreneble al eksterfakulo, sentigas sin ankaŭ puŝoj kaj peloj interne de la lingvo-scienco mem. Specifaj fonologiaj, sintaksaj, morfologiaj, semantikaj problemoj, kiuj aparte klare aperas en tiu aŭ alia lingvo, subite amasigas specialajn referaĵojn kaj verkojn pri ĝi. Plej ofte temas pri aferoj, kiuj rilatigas la koncernan lingvon al aliaj, spece aŭ familie.

Ĝuste la relativa unikeco, do nerelatigeblo de Esperanto, kaj ĝia manko de propraj homoj kaj ekonomiaj rimedoj, igas ĝin aparte nealloga studobjekto por lingvo-sciencanoj. Tio ĉi pli-malpli komencas respondi la demandon [A] – *kial entute la malinteresiĝo pri Esperanto.*

Por pli profunda respondo oni devas ekkonsideri la enhavon de la lingvo-scienco tempe de la lanĉiĝo de Esperanto. La sciencan arenon okupis la historia demando: kio venis el kio? Oni volis ekscii la devenon de lingvoj kaj de iliaj formoj. Oni kolektis kaj kribris faktojn pri diversaj lingvo-familioj, precipe en la hind-eŭropa, kiu etendiĝas de la islanda ĝis la asama, de la rusa ĝis la orisa. Oni teoriis pri la principoj, kiu okazigas la observatajn evoluojn. Tia emfazo kompreneble ŝovis la malregulecojn de morfologioj kaj sonsistemoj malfonen. Ĝuste en la amaso de ŝajne ĥaosaj lingveroj oni strebis trovi la spurojn de ordaj principoj. Esperanto, kies esenco staras sur konscia evito de la vortforma komplekseco, ne povis esperi justan atenton en tia klimato.

Tio venigas nin al demando [B]. Multaj homoj scias, ke la lingvoscienco forvenis el tiu interesiĝo pri la malregulecoj kaj ĉiam pli fokusas al la grandaj universalaj regulecoj, kiuj regas ĉiujn lingvojn. Oni scias ankaŭ, ke oni nuntempe malpli fanatike kuras al la pasinteco aŭ al lingvoj de homgrupoj, kiuj ne naskas siajn proprajn gramatikistojn, kaj ke oni ĉiam pli emfazas la ĉi-tiamon kaj ĉi-tieon, la homan kaj median kuntekston, en la scienca analizo de la lingvo kaj ĝia uzo. Ĉu do oni ne estus atendinta rimarkindan malfalon de la scienca atento al Esperanto, anstataŭ male?

Unuan respondon ni akiras per ordinara ekzamenado de la evoluo de la lingvo-scienco. Jam dum la epoko de historiemo oni estis komencinta la "internan rekonstruon", metodon, kiu dependas de la interna kohero de individua lingvo-sistemo kaj ne de historiaj rilatoj inter malsamaj lingvoj. Oni baldaŭ sukcesis krei metodojn, kiuj venigas al la analizo de unu individua lingvo la precizecon antaŭe atingeblan nur per *la kompara kaj historia studo* de pluraj lingvoj... Naskiĝis *la struktura lingvo-scienco*, kiu votis matematike zorge diagrami la veran strukturon de ĉiu alirebla lingvo... Paradokse, ĝuste la sistema reguleco de Esperanto kaŭzis, ke ĝi maltrafis ankaŭ la strukturan vagonaron. La strukturaj lingvo-sciencistoj interesiĝas pri lingvoj, kiuj anstataŭ surhavi la koron sur la maniko kaŝas ĝin, donante al la sciencistoj okazon eldetektivi la veran strukturon per ĉiam pli rafinitaj metodoj de spurado. Esperanto estis tute neekscita ĉasejo.

Post la struktura fazo venis NOAM CHOMSKY [Ĉomski], kies pensado revoluciis la tutan sciencon ekde 1957. Por niaj celoj gravas emfazi du el la mil facetoj de ĉi tiu revolucio. Unue, la lingvo-scienco de CHOMSKY apogiĝas sur la lingvo-sento de denaskaj parolantoj de nuntempaj lingvoj. Due, eĉ pli komplete ol la struktura lingvo-scienco ĝi emfazas sistemajn koheron kaj konsekvencecon. Ĉi tiuj du aferoj igas la analizon de Esperanto per modernaj metodoj ekstreme malfacila. La plimulto de la parolantoj de Esperanto ne estas denaskaj. Kaj la lingvo-uzo de Esperanto estas ne-unueca ĝuste en tiu parto de la gramatiko (la sintakso kaj la fraza gramatiko), pri kiu la modernaj lingvo-sciencistoj plej interesiĝas... Bedaŭrinde (tiuj lingvo-sciencistoj, kiuj) kritikas CHOMSKY pro lia troa atento al la regulecoj en la lingvoj... prefere dronas en la sama ĥaoso da lingveroj, kie iam hejmis la historiemaj lingvo-sciencistoj; certe ne de tiuj homoj Esperanto ĉerpos simpation kaj analizemon.

Iomete pli ĝeneralan respondon donos al ni konsiderado pri la tuta lingvo-scienca industrio kaj ĝiaj sociaj radikoj.

Kiel oni scias, la aranĝojn de la moderna mondo starigis diversaj tru-

doj kaj konsentoj fare de okcidentaj (blankulaj) nacioj dum la lastaj jarcentoj, kun iom da helpo de elementoj en la neokcidento, kiu konsentis kunlabori. Estus stulte troigi la gradon de unueco de la okcidenta naciaro, sed certe almenaŭ esperantistoj bone scias, ke la eksteraj kvereloj inter okcidentaj lingvoj kaŝas ilian kernan kaj komunan oponon al graviĝo de la ĉina, araba, hindia kaj aliaj neokcidentaj lingvoj.

Nu, la istoj de la moderna lingvo-scienco, kiel en la aliaj homsciencoj, pli-malpli akceptas la aktualajn aranĝojn de la mondo. Tiu akcepto datiĝas jam de longe, tiel ke la historiaj fazoj de la scienco respondas al fazoj en la historio de la maniero de okcidenta mondestreco.

La **historia** lingvo-scienco apartenis al la tempo de frua estiĝo de la modernaj imperioj. La lingvo-sciencistoj venis kune kun la koloniantoj (ekzemple al Hindlando) kaj ĉerpis el la nove renkontitaj landoj rimedoj (materialojn el lingvoj kiel la sanskrita kaj ĝiaj idoj) por pli bona solvo de la sistemkonstruaj problemoj ĉe hejmlingvaj gramatikoj (de la angla, germana k.s. kaj de la antaŭulaj lingvoj latina kaj helena).

La **struktura** lingvo-scienco ekapogeis en la momento, kiam la libera doktrino ekhavis la impulson doni al la neblankaj kulturoj principan egalrajtecojn. En ĉi tiu kunteksto oni devas kompreni la aserton de la strukturaj lingvo-sciencistoj, ke ĉiuj lingvoj de ĉiuj tempoj estas egale studindaj kaj komplekse evoluintaj.

Kaj la **moderna** lingvo-scienco de kaj kontraŭ CHOMSKY apartenas al tempo, kiam la mondo estas formale demokratia kaj la okcidento konservas sian mondestrecon pere de la kunlaboremaj okcidentlingve trejnitaj indiĝenaj elitoj en neokcidentaj landoj. Unuflanke, al la aspiroj de la elitanoj pri kultura aŭtonomio respondas la agnosko en la moderna lingvo-scienco de la graveco de la lingvo-sento de denaskaj parolantoj. Aliflanke, al la nekontestata hegemonio de la okcidento respondas la fakto, ke la esplorprincipojn determinas la frapaj ecoj de la ĉefaj blankulaj lingvoj.

Se la moderna lingvo-scienco tiel komplete spegulas la diktan potencon de la okcidento-dominataj aktualaj mondarangoj, ne estas mirinde, ke sisteme preterlasiĝas objektoj kiel Esperanto, kies scienca studo minacas senvualigi la ne tre prifierindan lokon de la scienca profesio en la monda socio.

Ĉu la konkludo povas esti, ke estas senutile barakti kontraŭ la simptomo (lingvo-scienca ignoro de Esperanto) kaj ke necesas, ke esperantistoj konscie aliancigu sin kun la ĝis nun sporadaj, sufokataj, etgrupaj fortoj en la mondo, kiuj klopodas vere forigi la malekvilibron de potenco kaj komforto inter la okcidendo kaj la cetera mondo?

La artikolo aperis en la "Transoceania" Revuo de PAPIE n-ro 15, 1979. pĝ. 6-9.

Rim. de la red. de "Transoceania": Se tiu grava tezo (pri kiu PROBAL mem supozas, ke ĝi povas esti "ŝovinisme kontraŭblankula") pravas, ni rajtis tiri du konkludojn:
1. Esperanto ne fariĝos "enmonda" objekto por la specialistoj, dum la nuna monda ordo restas;
2. Ĝuste pro tio, nia poresperanta laborado des pli gravas, ĉar ĝi partoprenas sur sia specifa kampo en la mondskala batalo por pli justa, pli humana tero.

La demando de IPR: *Kiel vi opinias pri tiu ĉi problemo? Ni atendas vian reagon!*

▼ IPR-Fonduso – revivigenda!

Konkreta propono: se iu kolego entreprenas ekde la sekva jaro pagi + unu kotizon por sia kolego aŭ kolegino el nepagipova lando ni kontaktos lin/ŝin kun la donacoto, kiu tutcerte trovos la rimedon rekompenci la donacon. Eble ili restos poste en daŭre kolega kontakto. Cent duoblaj kotizoj = 100 novajn membrojn! Antaŭdankon!

Instrupraktiko

CSEH-METODO EN NOVA "PROFESIA" VESTO

La centjariĝo de Esperanto postulas de ni ĉiuj specialan atenton sur diversaj kampoj de nia agado, sed speciale se temas pri la instruado.

La Internacia Esperanto-Instituto (IEI), kies celo estas eduki Cseh-metodajn instruantojn, konstatis, ke tiuj bezonas ne nur bonan lingvokonon, sed ankaŭ trejnadon en la metodo mem.

Oni diras ke "ne estas malbonaj lernantoj, sed estas nur malbonaj instruantoj". Unu el la kaŭzoj kiuj bremsas la disvastiĝon de Esperanto estas *ne taŭga* instruanto aŭ *ne taŭga* instrumetodo. Cseh-metodo, uzata de *bona* Cseh-instruanto, donas miraklajn rezultojn. Lernantoj ne malaperas de la kursoj, sed kontraŭe, la metodo allogas novajn kursanojn. Kaj la kurso finiĝas kun pli granda nombro de lernantoj ol per kiu ĝi komenciĝis. Kvankam la metodo jam estas aplikata dum pli ol 60 jaroj, tiu fenomeno ankaŭ nuntempe ripetiĝas, kiam *bona* instruanto gvidas la kurson (ekzistas bedaŭrinde ankaŭ fuŝuloj!).

Bona Cseh-instruanto devas ne nur bone koni la lingvon kaj ĝian struktruon, sed (kaj precipe) kapabli komprenigi novajn vortojn helpe de diversaj objektoj, kaj kapabli komprenigi la gramatikon kaj ĝian funkciadon per taŭgaj ekzemploj. Tion oni ne povas proprigi al si aŭtodidakte. Por ebligi al Esperanto-instruantoj atingi profesian instru-nivelon kaj diplomon kiu rajtigos ilin instrui eksterlande, IEI ne nur revizias la Cseh-kurson sed ankaŭ funkciigis tri-ŝtupan trejnadon: seminarioA (enkonduka), seminario B (pliprofundiga) kaj seminario C (diplomiga). Ĉiu seminario daŭras 25 studhorojn.

Dum la seminario A la partoprenantoj konatiĝas kun la metodo, teorie kaj praktike, observante lecionojn kiuj estas gvidataj laŭ ĝi; konstatas ĉu ili taŭgas por tiaspeca instruado, ofte konsciiĝas ke ilia

lingvo-kono ankoraŭ ne sufiĉas por instrui kaj komencas serioze studi la lingvon. Se la metodo konvenas al ili, ili aliĝas al seminario B por ne nur pliprofundigi la lingvoscion, sed ankaŭ studi la metodikon de Esperanto-instruado, diskuti instru-malfacilaĵojn, kaj interŝanĝi spertojn. La seminario C finiĝas per 20-minuta provleciono (gvidata de ĉiu seminariano), dum kiu ekzamena komisiono povas konstati la nivelon de la instruanto kaj ties kapablon uzi la metodon. Dum la seminario C oni ankaŭ konatiĝas kun aliaj rektmetodaj instrumaterialoj.

Inter la Esperantistoj ŝvebas la falsa opinio ke Esperanto estas tiel facila lingvo, ke ĉiu kiu povas ĝin paroli ankaŭ kapablas ĝin instrui. Paroli la lingvon kaj instrui ĝin estas du tute diversaj aferoj, kaj plene eraras tiuj, kiuj asertas ke "por instrui Esperanton oni bezonas koni nur unu lecionon pli ol la lernanto"! Sekve de tia falsa opinio/teorio pluraj komencas instrui, faras tion amatore, ofte malbone, timigas la lernantojn, kiuj seniluziigitaj foriras por neniam reveni, aŭ, se ili restas, fariĝas "eterna komencanto". Por eviti tion IEI ebligas al kandidat-instruantoj profesiiĝi en la instruado laŭ la Cseh-metodo.

Kandidatoj, kiuj plenumos la postulojn de la tri seminarioj
- ricevos rajtigilon de diplomita CSEH-instruisto
- estos enskribitaj en la registron de IEI kaj rajtos gvidi Cseh-kursojn aŭ Cseh-seminariojn ie ajn en la mondo laŭ invito de Esperanto-grupoj kiuj bezonas helpon tiurilate
- rajtas profiti de la "help-fonduso – Andreo Cseh" ĉe IEI.

Informaĵo de: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW DEN HAAG, Nederlando (telefono 070-556677, poŝtĝirkonto 508601 nome de "Help-fonduso Andreo Cseh" en Den Haag).

ILEI-Konferenco: la XXa

Esperanto: 99-jara

NI RENKONTIĜU EN LOVENO

PSALMUS HUMANUS
Sesa psalmo

Albert SZENT-GYÖRGYI[1]

Niaj idoj

Plejpotenca!
Laŭ seksoj Vi disigis la homojn, por ke ili sopirante sin reciproke konkordiĝu animprofunde.
Fruktoj de kunsopiroj estas la infanoj, la karaj infanoj,
Kiuj kun pura, senmakula spirito alvenas.

Kaj mi inokulas iliajn spiritojn per malamo, timo kaj antaŭjuĝoj,
Miaj bunkroj instruas al ili, ke la vivo malhelas kaj la bonvolo vanas,
Kaj ilin plenkreskintajn, pretajn je noblaj faroj,
Mi transformos en oficialajn murdistojn,
Kaj iliaj plej belaj jaroj pasos en morala paralizo.

Plejpotenca! Savu miajn idojn,
Savu iliajn spiritojn,
Mia difektiĝo ne difektu ilin,
Savu ilian vivon.

La armilo, kiun mi direktas al la aliaj, ne pereigu ilin,
Ili estu pli bonaj ol la gepatroj,
Ili fondu sian propran regnon,
La regnon de belo, justo, honesto, konkordo kaj bonvolo,
Paco kaj amo regu
Eterne.

Tradukis Imre SZABÓ

1. nobel-premiito pri fiziologio kaj medicino, 1937.

1986 – Jaro de la PACO

Ĉu la "paco" povas esti temo de jara kampanjo? Ĉu la fakto, ke 1986 estas deklarata "jaro de la paco" signifas, ke ĝi estas "pli paca" ol estis la 1985a aŭ estos la 1987a? Ŝajne tiun ĉi epiteton oni devas koncepti nur tiel, ke en 1986 oni analizu la fenomenon "paco" plurdimensie: ne nur politike, sed ankaŭ psikologie, sociologie, pedagogie... Direktiĝu al la pacproblemo refletoroj el ĉiuj direktoj!

Oni ofte ripetadas Latin-lingve la sensencaĵon: "*Se vi volas pacon, pretiĝu al la milito!*". Ni pedagogoj diras: "*Se vi volas pacon, pretiĝu al la paco!*" – ĉar ni ~~sicas~~ scias, ke – laŭ la plej elementa didaktika leĝo – iun emon, inklinon, kapablon oni povas elformi nur per samspecaj ekzercoj: la pacemon per elformado de tiaj karaktertrajtoj, kies fina rezulto estos la pacemo.

El pedagogia vidpunkto la pacemo estas kompleksa fenomeno. Inter ĝiaj komponentoj ni konsideras la humanismon, la internan trankvilon, spiritan ekvilibron, estimon de aliuloj – apartenu ili al niaj proksimuloj aŭ al fremduloj k.s. Al la kontraŭ-direktaj efikoj ni vicigas tiajn trajtojn kiel la apatio kaj agresemo, mensogo kaj cinismo k.s.

Unue pri la ĉi-lastaj. Neniu pedagogo edukas konscie al malpaco. Sed la influo de pedagogoj kompare kun la "eksterlernejaj" influoj ĉiam pli-kaj-pli malkreskas, malfortiĝas. En nia tempo ĝuste tiuj fenomenoj, kiuj devus efiki pozitive kaj kontribui al la elformado de pacemaj karaktertrajtoj inversiĝas: *la sporto* transformiĝas je perforto, detruado kaj krueleco, *la muziko* je orelŝira bruo, *la literaturo* al krimo, seks-aberacio kaj hororo, *la filmo* je ekspozicio de kadavroj. La banditismo, terorismo, piratismo estas ĉiutagaj eventoj, plenigantaj la kolumnojn de gazetoj kaj ĵurnaloj...

Unu el la plej danĝeraj fenomenoj estas la oficialigita, instituciigita **mensogado**. En la tag-ĵurnaloj oni legas la raportaĵojn de la du batalantaj partioj. Ambaŭ partioj raportas ĉiam pri venkoj. Ĉiam nur la malamiko retiriĝas kaj perdas teritoriojn, aviadilojn, havas mortin-

tojn, vunditojn kaj militkaptitojn. La juna leganto tuj rimarkas, ke unu el la partioj mensogas kaj el tio li konkludas: la plenkreskuloj mensogas! Hejme oni pridiskutas la eventojn, ankaŭ en la lernejo, ankaŭ inter la geamikoj. Povas okazi (kaj ofte okazas) ke ekestas kontraŭdiro inter la gepatra kaj pedagoga opinio. La infano denove konvinkiĝas, ke unu el inter ili mensogas: aŭ la pedagogo, aŭ la patro. Kaj ennestiĝas en la animo de la infano la *cinismo*: ne plu kredas nek al gepatroj, nek al pedagogo.

Estus interese analizi kion instruas **la lernolibroj de historio** pri la sama fakto. Ne temas pri interpretado, sed pri la priskribo de la fakto mem: ĉu ĝi okazis aŭ ne, kie, kiam, kial, kiel? Evidentiĝus, ke pri la sama historia fakto la lerneja junularo en diversaj landoj ricevas diversajn (ofte kontraŭdirajn) informaĵojn. El inter ili ĉiuj nur unu estas vera, ĉiuj aliaj estas falsaj, misaj. Sed kiu povas scii post jarcentoj kio vere okazis, kiam pri la eventoj de niaj tagoj, kie nunvivantaj homoj estas atestantoj, ni ricevas kontraŭdirajn informiĝojn?

La tekniko devus servi al la plifaciligo, pliagrabligo, plibeligo de la vivo. Sed kio okazas? La fantazio de infanoj, edukataj per "sciencfikcia kulturo" sekiĝas, la filmoj plifortigas la *agresemon*: la konstanta prezentado de la perforto edukas ja al la perforto. La alia danĝero estas la *apatiigo* de la junularo. La antaŭaj hororoj ne plu kontentigas la spektantojn: ĉiu nova filmo devas esti pli terura ol estis la antaŭa por varbi la horor-soifan spektantaron. La video-tekniko transformiĝos je horor- kaj porno-edukiloj: karakterize, hodiaŭ la termino "videofilmo" estas kvazaŭ sinonimo de "horor-filmo" aŭ "porno-filmo".

Ankaŭ **la muziko** kontribuas al la edukado al agresemo: en ĝi iompost-iom malaperas la melodio, restas nur la takto, kiu transformiĝas je la bruo: ju pli forta ĝi estas, des pli "moderna" ĝi estos. Tiu bruego strečas la nervojn, turnas la cerbojn...

La sport-arenojn la amaso vizitadas ne por ĝui la belecon de la ludo sed por peli la ludantojn, por instigi ilin al perforto, krueleco, neniigo de la kontraŭulo. Parto de la amaso en la stadionoj elvivas la bestecajn instinktojn, hurlante dum la tuta tempo, blasfemante la kontraŭulan

teamon kaj eĉ – atakante ĝian zelotaron. La sportistoj ne plu ludas, sed batalas, luktas, militas por venki, por gajni: ĉar por la venko ili ricevas ne laŭr-kronon sed milionojn.

Sed ni revenu al la **lernejo**. Trarigardante la programojn de la unuopaj studobjektoj, instruataj en la Hungaraj mezlernejoj, inter la edukaj celadoj ni serĉis tiujn elementojn, kiuj kontribuas al la pacedukado.[1]

Pri la "edukado al *proleta internaciismo*" – kiel celo, mi trovis en la programo de la sekvaj studobjektoj: gepatra-lingva literaturo, historio, fiziko, geografio. Pri la edukado al *socialisma internaciismo*: en la programo pri la Rusa lingvo kaj historio.

La vorto *"paco"* – kiel celo – troviĝas nur en du lokoj: en la eduka celo de la instruado de historio en la IV-a (lasta) klaso:

"... la internacia politiko de socialismaj landoj baziĝas sur la principo de paca kunvivado; en ilia politiko realiĝas la strebado al la solvo de la ĉefaj problemoj de nia epoko, al la kontentiga solvo de la problemoj de milito kaj paco." (pĝ. 127);

en la programo de la studobjekto "Fundamentoj de mondkoncepto" por la IV-a klaso:

"La studobjekto eduku la gejunulojn al la servo de socia progreso, al la servo de la afero de socialismo kaj paco..." (pĝ. 133).

Karakterize, la plej eksplicitaj formuladoj de la *internacia interkompreniĝo* kaj *interpopola amikeco* troviĝas en la programoj de fremdaj lingvoj.

Ili ĉiuj pli-malpli similas, kelkfoje estas tute la samaj. Ĉar tiu ĉi problemo tuŝas nin plej proksime, ni vidu ilin detale:

Rusa lingvo – *celo*: "... ebligu la enrigardon en la kulturon, historion, kutimojn de la popoloj de Sovetunio, en la socian kaj politikan vivon de la lando, per tio helpante la internacian interkompreniĝon kaj pliprofundiĝon de la interpopola amikeco." (pĝ. 149);

1. Laŭ la oficiala programo, eldonita de Instru-Ministerio de Hungario

Angla lingvo – *celo*: "... donu informaĵojn pri la Angle-parolantaj landoj, pri iliaj socia sistemo, kulturo, kutimoj, kaj per tio ĝi servu la ideon de la internacia interkompreniĝo kaj interpopola amikeco."

La *celo* estas laŭvorte la sama ĉe la Franca, Germana kaj Hispana lingvoj (memkompreneble anstataŭante la "Angle-parolantaj" per France-/Germane-/Hispane-). Ĉe la *taskoj* estas jam certaj devioj:

Taskoj de la edukado: **Angla lingvo:** "La instruado de Angla lingvo per siaj specifaj rimedoj kontribuu al la morala-ideologia kaj estetika edukado de la lernantoj, al la konatigo de la Angle-parolantaj landoj, kaj al la kompreno pri la soci-ordo, pensmaniero kaj sento-mondo de la homoj, vivantaj en tiuj landoj; kaj samtempe pere de tio oni eduku al la interkompreniĝado inter popoloj, al la estimo de aliaj kaj al la paca kunvivado inter la popoloj.

Germana lingvo – *tasko*: "La instruado de la Germana lingvo kontribuas al la ekkono de la socia sistemo, pensmaniero kaj sento-mondo de la Germane-parolantaj popoloj, per tio ĝi edukas al la interpopola interkompreniĝo, al la rekono de la rezultoj de aliaj popoloj, al la internaciismo.

Franca lingvo – *tasko*: "La instruado de la Franca lingvo servu al la ekkono kaj kompreno de la socia sistemo, pensmaniero kaj sento-mondo de la France parolantaj popoloj, inter ili ankaŭ al tiu de la evolulandoj. Tiu helpas la politikan-socian orientiĝon de la gelernantoj kaj kontribuas al la edukado al paca kunvivado kaj internaciismo.

Hispana lingvo – *tasko*: "La instruado de la Hispana lingvo kontribuu al la ekkono kaj kompreno de la socia ordo, pensmaniero kaj sento-mondo de Hispane parolantaj popoloj; samtempe pere de tio ĝi edukas al la interkompreniĝado inter la popoloj, al la ekkono de la atingaĵoj de aliaj popoloj, al la paca kunvivado.

Ĉe la **Itala lingvo** la celo jam diferencas disde la supraj kvar lingvoj: *celo*: – "Klerigu la lernantojn per modernaj konoj, koncernantaj informaĵojn pri Italio, pri la vivo de la Itala popolo kaj junularo, pri la Itala sociordo kaj kulturo, pri Italaj-Hungaraj rilatoj."

Tasko: "... oni eduku al la estimo de belo kaj al la estimo de universalaj kreitaĵoj (verkoj) kaj artoj de ĉiuj popoloj; al la kompreno de la graveco de kulturaj, ekonomiaj kaj politikaj rilatoj kaj al la ideo de paca kunvivado."

Ĉe la instruado de **Latina** tiaj elementoj mankas kaj ĉe la celoj, kaj ĉe la taskoj.

Nun ni trarigardu la programojn de la najbaraj lingvoj:

Serbo-Kroata: *celo* – "... donu informaĵojn pri Jugoslavio, pri la popoloj de la lando, pri ĝia socia sistemo, kulturo kaj pri la Sud-Slavaj nacioj, vivantaj en nia patrujo. Pere de ĉiuj ĉi, ĝi servu la idearon de la internacia interkompreniĝo kaj interpopola amikeco."

Tasko: "La Serbo-Kroata lingvo estas la oficiala lingvo de kvar Respublikoj de la Jugoslava Socialisma Federacia Respubliko, la gepatra lingvo de la Serba kaj Kroata nacioj, vivantaj en nia patrujo. La ĉiam plivastiĝantaj ekonomiaj, kulturaj ktp. rilatoj kun Jugoslavio, la evoluo de la fremdultrafiko kaj internacia turismo, ebligas la praktikan utiligon de la Serbo-Kroata lingvokono."

Slovaka lingvo – *celo*: "Imprese konatigi la lernantojn pri la vivo de la Slovaka Socialisma Respubliko kaj pri la vivo, kulturo kaj literaturo de Hungariaj Slovakoj, kun la historiaj rilatoj inter la Hungara kaj Slovaka popoloj, kun la nuntempaj kulturaj, politikaj kaj ekonomiaj rilatoj kaj per tio ĝi servu la ideon de internacia interkompreniĝo kaj interpopola amikeco;

Tasko: "La kono de Slovaka lingvo kontribuas al la ekkono kaj kompreno de la sentoj kaj pensmaniero de la popoloj de Socialisma Ĉeĥoslovakio, pere de tio samtempe ni edukas al la interpopola interkompreniĝo, al la rekono de alipopolaj atingaĵoj kaj al internaciismo."

Rumena lingvo – *celo*: "La instruado de Rumena lingvo donu informaĵojn pri Rumenio, pri la nuna situacio, socia sistemo kaj historia pasinteco de la Rumena popolo, pri la paraleloj de la Hungara-Rumena historio, pri la kulturo, pri la Hungaraj-Rumenaj rilatoj kaj same pri la Rumena nacio, vivanta en nia patrujo."

Tasko: "... per la instruado de Rumena lingvo oni formu la politikan profilon de la lernantaro, oni kontribuu al la formado de moralaj karaktertrajtoj, pozitivaj personaj kvalitoj kaj kondut-formoj, karakterizantaj la socialisman homon; oni eduku al la socialisma humanismo, al la kompreno de la graveco de kulturaj, ekonomiaj kaj politikaj rilatoj inter la popoloj;

Fine – ni vidu la samon ĉe Esperanto!

Esperanto – *celo*: "La instruado de Esperanto ... donu informaĵon pri la universala homa kulturo, pri la universala valoro de artaj kaj literaturaj verkoj de malgrandaj popoloj, pri la klopodoj de la progresivaj internaciaj movadoj kaj per tio ĝi kontribuu al la interhoma interkompreniĝo, al la paca kunlaborado de la popoloj kaj al la internacia amikeco."

Tasko: "Por efektivigi ĉi celojn, la tasko de la instruado de la studobjekto estas: helpi la konceptan edukadon de la lernantaro, ilian politikan-socian orientiĝon kaj per tio ĝi kontribuu al la paca kunagado kaj al la edukado al internaciismo.

Plisube: "Oni konatigu la lernantojn pri la specifeco de Esperanto, nome, ke ĝi ĉesigas la privilegiojn de la naci-lingvanoj kaj konvinkas la lernantojn, ke inter la lingvoj kaj kulturoj, reprezentataj far ili, ne ekzistas kvalita hierarkio. Pere de tio ĝi servas la edukadon al la patriotismo, integrita en internaciismon." *Poste*: "La socian-intelektan pliriĉigon de la lernantaro oni devas efektivigi ankaŭ pere de Esperant-lingva materialo. Oni fruktuzu la specifecon de Esperanto, ke ĝia 'kultura materialo' ne limiĝas je unusola kulturo, reprezentata far unusola lingvo, ĝia 'landkona materialo' ne estas ligita al la lingvoteritorio de unu lando..."

Post la tralego de tiu ĉi skizo, vi kolektu viajn pensojn kaj dum la konferenco ni pridiskutu la sekvajn temojn:

1. Kiu el la fremdaj lingvoj, instruataj en diversaj lernejaj sistemoj estas plej taŭgaj por eduki niajn lernantojn al:
   a. internaciismo;
   b. interpopola interkompreniĝo kaj amikeco;
   c. sendiskriminacia reciproka interpopola estimo;
   ĉ. paco?
2. Por tio estus tre bone, se ankaŭ vi alportus al la Konferenco la saman materialon el via lerneja sistemo, t.e. ĉe kiuj studobjektoj, ĉe kiuj fremdaj lingvoj rolas inter la celadoj kaj taskaro tiuj elementoj, kiuj edukas al la supraj [a-ĉ]?
3. Kiel vi povas klarigi la diferencojn inter la cel- kaj task-difinoj en tiu ĉi artikolo?
4. Kion ni faru por ke la oficialaj instancoj akceptu niajn argumentojn, koncernantajn la edukajn valorojn de Esperanto?

Ni esperu, ke niaj diskutoj estos fruktodonaj kaj havos valorajn, praktike uzeblajn konsekvencojn!

La redaktinto

Ĉu vi konas ĝin? Se ne, nepre ni konsilas al vi mendi kaj tralegi ĝin! Ken Keyer Jr., *La centa simio* (Ne estas kuracilo kontraŭ nuklea milito nur prevento). Trad. Joek Naber-Keller. Eld. Internacia Esperanto-Instituto, Hago, 1984.
El la antaŭparolo: "Ĉi tiu libro estas dediĉita al dinosaŭroj, kiuj mute avertas nin, ke specio kiu ne povas adaptiĝi al la ŝanĝiĝantaj kondiĉoj, estingiĝos".

Diskutmaterialo al la temo: "Lingvo-lernejo-paco", dimanĉe la 13-an posttagmeze de la 14,30 ĝis la 16.00 h.

FERENC, FRANZ AŬ FRANÇOIS LISZT?

(eble Francisko?)

István LÁSZLÓ

Antaŭ 175 jaroj naskiĝis kaj antaŭ 100 jaroj mortis la mondfama pianartisto kaj komponisto FERENC LISZT. Lia naskiĝvilaĝo estis Doborján (nun Raiding en Aŭstrio), apartenanta tiutempe al la Hungara departemento Ŝopron. La patro frue rekonis la esceptan talenton muzikan de la filo kaj kaptis ĉiun eblon por disvolvigi lin. LISZT jam en sia naŭa jaro pianludis antaŭ publiko en Ŝopron kaj en la ĉirkaŭaj urboj. En 1822 li prezentis sian talenton en Vieno, kie ankaŭ BEETHOVEN ekatentis lin. Baldaŭ sekvis lia debuto en Londono. Intertempe mortis lia patro kaj la deksesjara LISZT mem devis zorgi pri sia patrino kaj pri si mem. En 1827 li translokiĝis en Parizon, kie baldaŭ li famiĝis.

Lia gepatra lingvo estis la Germana. Post kelkaj jaroj en Francio la rolon de la gepatra lingvo transprenis la Franca. La junulo tie, en la plej grava kultura centro de la deknaŭa jarcento, akiris Franclingve la plej gravajn legaĵ-travivaĵojn. Pluraj el liaj kritikistoj mencias Francion, kiel lian "simbolan patrion".

Dume – ĉiu Hungaro konsideras LISZT kiel unu el la plej grandaj Hungaraj komponistoj. Ne nur pro lia "geografia patrio". Printempe en 1838 LISZT en Venecio eksciis pri la terura inundo, kiu preskaŭ tute detruis la tiaman ĉefurbon de Hungario, la urbon Peŝt. Tiam li verkis artikolon en iu gazeto kaj jen kion li skribas: "Mi sentis eksterordinaran doloron kaj nerezisteblan neceson helpi al la mizeraj homoj (...) ho mia fora patrio, mia granda familio (...) mi honte klinas mian kapon, ke mi tiel longe forgesis vin (...)"

La unuan geston li faris en Vieno. Dek koncertojn li aranĝis por helpi la mizerulojn. La respondo ne longe malfruis. La entuziasmaj Hungaroj de la Reformepoko ĝoje brakumis al sia brusto la "fidelan parencon". Dum la solena renkonto, kie la eminentuloj de la ĉefurbo akceptis kaj festis la hejmenvizitintan muzikiston, LISZT pianprezentis

la "Rákóczi marŝon" en sia individua stilo, kiel fantazion. Per siaj aliaj prilaboraĵoj, kiel serio de "Hungaraj rapsodioj", la simfonia poemo "Hungario" kaj la oratorio "Legendo de Sankta Elizabeto" li volis akcentite esprimi la apartenecon al sia Hungara patrio.

Plurfoje leviĝas la demando, ĉu LISZT vere estis Hungara komponisto tiusence, kiel FERENC ERKEL kaj la komponistoj de la dudeka jarcento? Kaj en tiu medito ne temas pri liaj sentimentoj, aŭ patriotaj emocioj, kiuj ligis lin al la Hungararo, eĉ ne pri tio, kiagrade li parolis la Hungaran lingvon. Multe pli la fonto de la LISZT-muziko donis okazon pri la diskutoj. La muzikon de la Hungaraj vilaĝoj, pro liaj vivmaniero, kariero kaj cirkonstancoj, li ne povis ekkoni, kvankam plurfoje li okupiĝis pri la penso definitive translokiĝi en Hungarion. Sed lia sorto drivis lin en plurajn direktojn kaj fine en Bayreuth, en la urbo de WAGNER li finis sian vivon.

Dum li travojaĝis la tutan Eŭropon kaj ekkonis ĉiam novajn spiritajn tendencojn, en siaj lastaj jaroj li ofte vojaĝis al Peŝt, por antaŭenigi la aferon de la fondota Muzikakademio. La duonon de tiuj jaroj li ĉiam pasigis en Peŝt kaj entuziasme instruis.

Dum sia Weimar-a periodo LISZT malofte koncertis kaj pli multe komponis. Sed liaj Weimar-aj komponaĵoj jam signife diferencas disde la antaŭaj: en ili jam malaperas la alloga brilo kaj demona tekniko de la pian-virtuozo. La *Mortodanco* kaj la *Faust-Simfonio* montras tiun deflankiĝon, kaj tiuj liaj komponaĵoj jam vere formas arkon al lia pliposta heredanto, BÉLA BARTÓK.

Ĉu ĝuste ni, esperantistoj, diskutu pri tio: al kiu nacio li apartenis? Tio estus tute kontraŭa al nia pensmaniero. Ĉar por ni LISZT estas grava ĝuste tial, ke li apartenis ne al tri nacioj, sed al tuta Eŭropo, al la tuta mondo. Kiam ni memoras lin, ni memoras la "homon", kiu per sia verkaro jam de pli ol tuta jarcento donacas al la homaro noblan, artan ĝuon. Ĝuste tial UNESKO proponas ĉi-jare memori lin.

Pli detale pri la sama temo dum la "arta vespero" – marde la 15an, inter la 20a kaj 21.30a horoj!

LA KONFERENCEJO KAJ LA KONFERENCURBO

La Katolika Universitato dum la malnova reĝimo

La fondo en 1425 de la Universitato en Leuven[1] okazis dank' al diversaj cirkonstancoj, i.a. la ekonomia ekfiniĝo de la Urbo Leuven sekve al la stagnado de ĝia drapindustrio, kaj samtempe la nepra volo de duko Johano IVa de Brabanto haltigi la foriron de multnombraj Brabantanoj kiuj preferis studi eksterlande.

Ĉar en tiu epoko neniu Universitato estis starigebla sen eklezia permeso, la duko Johano IVa direktis sin al Papo Marteno Va kiu, per buleo de la 9a de decembro 1425, permesis la fondon en Leuven de la unua Universitato en la tiamaj "malaltaj landoj ĉe la maro" t.e. la nunaj Belgio kaj Nederlando.

La nova Universitato konsistis el kvar fakultatoj: Juro, Medicino, Artoj kaj Teologio. Dum la XVa jarcento, la Lovena Universitato aktive partoprenis la tiamajn fluojn de ideoj. Tiel, la Fakultato de Teologio estis implikiĝinta en la reformo de la kalendaro. En la sekvonta jarcento, kreiĝis la fama "Kolegio de Tri Lingvoj", kiu iĝis fokuso de beletra kritiko kaj filologiaj studoj; ĝi cetere estiĝis modelo por la fondo de la *Collège de France* (Kolegio de Francujo) en Parizo.

Tamen, en la dua duono de la XVIa jarcento, la Universitato forte sentis la rebaton de la religiaj militoj, kiuj traskuis la tutan landon. Ĝi iomete retrovis sian iaman brilon komence de la XVIIa jarcento, dank' al la disradiado de ĝia Jura Fakultato. Sed tiu ekkvietiĝo ne longe daŭris, kaj la Universitato denove estis traskuita de militoj.

En la XVIIIa jarcento, dum la Aŭstra centraliga reĝimo, la Universitato troviĝis sub la kuratoreco de registara komisaro kaj tiel perdis sian antaŭan sendependecon.

Ĝi fortege rezistis la perdon de tiu aŭtonomio kaj la reformojn, kiujn la Aŭstra Imperiestro volis altrudi. Tiu konflikto tamen abrupte

1. Nederlanda: Leuven; Franca: Louvain; Esperanta: Loveno. Louvain-la-Neuve: Loveno-la-Nova.

2. Ne eblas kompreni la nunon kaj projekti la futuron nekonante tiun **historian trajektorion**, kiun trapasis la ideo ekde la komencoj ĝis hodiaŭ.

La plej granda manko de la nuntempaj interlingvistikaj esploroj estas, ke ili ne konsideras la ĝeneralan historian epistemologian fonon, tiun idean "infrastrukturon" en kiu naskiĝis, el kiu kreskis kaj kiu nutris ĉi ideojn.

2.1. Laŭ la plej ĝenerala opinio la unua periodo en interlingvistiko komenciĝas per RAJMONDO LULLO (1235-1315) kaj daŭras ĝis GOTTFRIED WILHELM LEIBNIZ (1646-1716) ĉ. kvarcent jarojn inter (rondigite) 1300 kaj 1700. Tion oni konsideras la filozofia periodo en interlingvistiko (pluraj verkoj, ekz. J. CARRERAS Y ARTAU, P. ROSSI, eĉ portas en titolo tiujn ĉi nomojn: "de LULLO ĝis LEIBNIZ").

Signi la komencon ĉe LULLO estas akcepteble – sed ne el tiu vidpunkto, kiel oni faras hodiaŭ. Sed ĉe LEIBNIZ ne finiĝas la filozofia periodo: estas pli ol evidente, ke ĝi daŭras minimume ĝis la fondo kaj funkciado de *Société Internationale de Linguistique* (Parizo, 1856-1860).

Tiun ĉi ĉ. sescent-jaran periodon oni povas nomi: *la periodo de universalaj/filozofiaj-teoriaj lingvoprojektoj*.

La dua periodo komenciĝas per la apero de *Volapuko* kaj daŭras ĝis hodiaŭ: *la periodo de internaciaj (praktikaj) helplingvoj* – fakte la lingvistika periodo en interlingvistiko.

2.2. Tiu ĉi kronologia divido grand-trajte kongruas kun la **tipologia** – tamen nur parte: la metamorfozo de ideoj ne ĉiam obeas la tempopason. Tio signifas, ke internaciaj lingvoprojektoj aperas en la unua periodo kaj inverse: filozofiaj projektoj aperadas ankaŭ en niaj tagoj. Temas nur pri tio, ke en la unua periodo regis la filozofia, en la dua la lingvistika (propradire: aplikata lingvistika) koncepto.

3. Antaŭ ol skizi la historian evoluvojon laŭ kronologia skalo unue estas difinendaj klare la du fundamentaj terminoj: la t.n. **"apriora"** kaj **"aposteriora"** modeltipo.

3.1. Kiel evidentiĝas el la antaŭaj ĉapitroj, la primara celo de la **"aprioristo"** estas la realigo de perfekta simetrio inter la signo kaj signifo. La bazo de ilia pensado estis la hipoteza antaŭkondiĉita ideo-prioritato logiko-semantika: la kategorioj de la homa ekkon-kapablo, speguligantaj la realaĵon. La signo havas nur realaĵ-markan funkcion.

En la antaŭa ĉapitro ni aludis al la ĉefa eraro de "apriorismo", nome: la neglektado de fundamenta fakto, ke la eksterlingva semantika-logika bazo, sendependa de unuopaj konkretaj lingvoj, estas ekkonebla nur pere de lingva substanco: el la senfina trezorejo de la universo nur tio estas ekkonebla, kio estas lingve konceptebla kaj esprimebla. Kiel HJELMSLEV, L., prave rimarkas: "Lingve, kaj nur per lingvo ni povas labori super 'la neesprimita' ĝis kiam ĝi esprimiĝos."


Ankaŭ la "aprioristo" modeligas "homan lingvon", sed – kvankam li ne "tradukas" unu aŭ plurajn lingvojn en la "novan/estontan lingvon" – ankaŭ li ekkonas kaj interpretas la realaĵon tra la prismo de certa(j) lingvo(j) (kp. § 1.3.1).

3.2. Ni konsideru la modeligon **tradukado**. Tiam estas distingeblaj kvar tradukad-tipoj:


a. *unulingva/monolingva* (interna) *tradukado* – restante inter la kadroj de unu sola/sama lingvo (ekz. parafrazo, transformado, sinonimio k.s.);
b. *heterolingva tradukado* – t.e. tradukado el unu etna lingvo en alian (ekz. el Angla en Francan);
c. *tradukado el unu semiotika sistemo en alian*;
ĉ. *tradukado de la eksterlingva realaĵo en arte konstruitan lingvon*.


La "aposteriora" sistemo apartenas al la c-tipa, la "apriora" sistemo al la ĉ-tipa "tradukado".


apriora modelo





aposterioraj model-tipoj











4. La **"aposterioristo"** akceptas protomodele la t.n. *"naturan lingvon"* (pri la termino "natura lingvo" pliposte!). Lia celo estas forigi la fonetikajn, grafikajn, leksiko-semantikajn, gramatikajn anomaliojn, neŭtraligi la naciajn-etnajn specifaĵojn de tiuj lingvoj, forigi tiujn karakterizilojn, kiuj malfaciligas la informaĵ-interŝanĝon inter homoj, parolantaj malsamajn lingvojn.

4.1. Jam KARTEZIO (R. Descartes, 1596-1650) – kiu cetere kritikis la lingvojn el filozofia vidpunkto – konsideris ke la plej grandaj konfuzigaj elementoj en la lingvoj estas la deklinaciaj, konjugaciaj kaj vortderivaj neregulaĵoj.

KOMENIO (J.A. Komenský, 1592-1670) profunde okupiĝis pri la *anomalia* problemaro. Lia devizo: "malmultaj reguloj, neniu escepto" ("Regulas paucas, exceptionem nullas") koncize formulas la modeligan bazprincipon, kiu sekvas el lia observo, ke en la etnaj lingvoj estas pli da anomalioj ol da reguloj ("Sit plus anomaliarum quam Regularum"). KOMENIO distingas tri tipojn de anomalioj:

a. *semantikaj* ("significationis")
b. *vortderivaj* ("formationis") kaj
c. *strukturaj/sintaksaj* ("structurae").

Fakte, la anomalia teorio de KOMENIO estas iom pli eksplicite disvolvita kaj pluevoluigita teorio de la *Stoikisma "analogia-anomalia diskuto"* perata pliposte far VARONO (Marcus Terentius Varro, ĉ. 116 a. Kr. - 27 a. Kr.).

(Daŭrigota)

solviĝis en 1795 pro la aneksado de la Aŭstriaj Malaltaj Landoj (la nuna Belgio) al la Franca Respubliko.

Ĉar ĝi malamikis la kontraŭreligiajn aranĝojn de la Franca Direktorio. la Universitato tutsimple fermiĝis en 1797.

La vojo al la nuntempa universitato

Forigita de la francaj revoluciuloj, la Lovena Universitato devis atendi la sendependecon de Belgio en 1830 por renaskiĝi en 1834 kiel la nuna Katolika Universitato de Loveno. Dum la tuta XIXa jarcento la renaskiĝinta Universitato laboregis al sia evoluo kaj disvolviĝo. Multnombraj Institutoj aŭ Sekcioj (Skoloj) fondiĝis por respondi al la scienca evoluo.

Tri esencaj okazaĵoj markis la historion de la Universitato en la daŭro de la XXa jarcento.

Unue, la milito 1914-1918, dum kiu la urbo estis disrabadita kaj la universitata biblioteko brulegigita. Pro tiu ruiniĝo, la universitataj aŭtoritatoj decidis fermi la Institutojn, kaj nur post la venko en 1918, la akademiaj aktivecoj rekomenis en urbo grandparte detruita.

La dua mondmilito iĝis denove malfeliĉega epoko por Loveno. Por la dua fojo en 25 jaroj, la biblioteko estis detruata kaj 885 000 volumoj perdiĝis.

Dum la tuta daŭro de la milito, la Universitato suferis la ĉikanaĵojn de la okupanto, sed ne povis fermi la pordojn. Kiel en 1914-1918, multnombraj membroj de la Universitato estis enkarcerigitaj aŭ perdis la vivon pro sia rezisto al la malamiko kaj sia dediĉo al la Alma Mater.

La tria okazaĵo estis la politika decido, – la 31a de marto 1968 – pro la evoluo en Belgio de unueca al federala ŝtatstrukturo, dividi la dulingvan unuecan Universitaton en du aŭtonomajn Universitatojn, nederlandlingvan kiu restis en la flandra urbo Leuven, kaj franclingvan, por kiu oni devis trovi novan sidejon.

Ĉi tiun sidejon oni trovis 30 km sud-oriente de Bruselo sur franclingva teritorio, kie konstruiĝis tute nova moderna universitata urbo, Louvain-la-Neuve. Tiel, iu ligo kun Leuven plu ekzistis. La Fakultato

de medicino kaj la Universitata kliniko tamen konstruiĝis en Brusela antaŭurbo, Woluwé-Saint-Lambert kaj nomiĝas Louvain-en-Woluwé.

La urbo Louvain-la-Neuve

La fondo de Louvain-la-Neuve estis la unua fondo de tute nova urbo post tiu de Charleroi en 1666. La iniciatintoj forĵetis la ideon de izolita "campus" ekster urba zono. Ili preferis integri la universitaton en tute novan urbon, laŭ homa dimensio, en kiu la kvalito de la vivo estus prioritata zorgo.

Oni do decidis konstrui sur la disponigita, 900 hektarojn granda ebenaĵo novan urbon, en ronda vivzono de 350 hektaroj kun diametro de 2 km por maksimume 50 000 enloĝantoj. La restantaj 550 hektaroj dispartiĝas en "scienca parko" de 143 hektaroj kaj verdaj zonoj.

Por garantii la kvaliton de la vivo, Louvain-la-Neuve i.a. formovis la aŭtomobilojn el la urbocentro. Kelkaj grandaj trafikaksoj, iuj eĉ subteraj, permesas traveturi la urbon, kaj grandaj parkejoj haltigas la aŭtomobilojn ĉe la urbolimo. Subtera stacidomo en la centro de la urbo ricevas la trajnojn el Bruselo, post 30-minuta veturado.

Troviĝas en la urbo 3 universitataj kaj 15 privataj restoracioj, 20 trinkejoj kaj 102 aliaj komercoj kaj servoj, 3 kinejoj, 2 teatroj. Memkompreneble, kiel en ĉiuj urboj, funkcias preĝejo, administraciaj servoj, publikaj libraj kaj revuaj bibliotekoj, muzeo kaj diversgradaj lernejoj. En la najbareco de la urbo, granda sportcentro disponigas al la publiko 3 banejojn kaj sur 10 hektargranda tereno ĉiuspecajn aliajn sporteblecojn.

La nova *Université Catholique de Louvain (UCL)*

La translokiĝo al Louvain-la-Neuve de la 17 000 gestudentoj kaj de ĉiuj servoj, realiĝis en 7 jaroj, de 1972 ĝis 1979. En 1984, la nombro de gestudentoj de UCL nombris 18 000, inter kiuj 3 346 eksterlandaj studentoj el 104 nacioj kaj 5 356 en Louvain-en-Woluwé, kie la universitata kliniko havas 900 litojn.

La nuna enloĝantaro de Louvain-la-Neuve estas proskimume 11 000, inter kiuj 8 300 gestudentoj. La aliaj studentoj loĝas ekster la urbo.

Instruado kaj esplorado fariĝas en dek fakultatoj, sub la gvidado de po unu dekano. Ĉi tiuj fakultatoj grupiĝas en tri sektoroj: Homaj sciencoj, Ekzaktaj sciencoj kaj Medicino. Scienca konsilanto asistas la Rektoron por ĉiu el la tri sektoroj.

La Fakultatoj estas dividitaj en Departementoj kiuj grupigas unuojn. Je ĉi tiu nivelo fariĝas la instruado kaj esplorado. Ekzistas 327 unuoj: 144 en la Homaj Sciencoj, 87 en la Ekzaktaj Sciencoj, 93 en la Medicina Sektoro, kaj tri eksterfakultataj unuoj.

La dungitaro estas multnombra kaj varia. 1000 membroj de la Akademia Korpuso instruas plentempe aŭ parttempe. 620 membroj de la scienca dungitaro enkadrigas la studentojn kaj proksimume 500 sciencaj esplorantoj laboras laŭ diversaj kontraktoj. Finfine, 1500 laboristoj, oficistoj kaj stabanoj funkciigas ĉiujn servojn de la Universitato, sub la ĝenerala gvidado de rektoro, nuntempe lia episkopa moŝto Massaux.

Ĝis nun, la Ŝtato kaj la Privata Sektoro investis pli ol 20 miljardojn da belgaj frankoj en Louvain-la-Neuve. UCL estas libera, katolika Universitato, ne ŝtata, sed la Ŝtato larĝe subvencias ĝin.

Sub ĉiuj tiuj ciferoj kaŝiĝas grandegaj, multaspektaj kaj ege intensaj laborado, zorgoj kaj penado, ankaŭ riĉenhava, kultura, socia kaj intelekta vivo. Estas do en tiu universitata medio ke okazos la 20a Internacia Konferenco de ILEI. La loko estas facile alirebla:

Trajne: el Bruselo-Ottignies-Louvain-la-Neuve (30′).

Aviadile: De la Flughaveno Zaventem, trajne al Bruselo (20′) kaj de Bruselo, trajne al Louvain-la-Neuve (30′).

Aŭtomobile: – veninte de Bruselo: aŭtoŝoseo nro 411 en la direkto de Namur. Unua elirejo post Wavre: Louvain-la-Neuve (blanka ŝildo) kaj sekvi la nacian vojon.

– veninte de Lieĝo-Luksemburgo-Namur en la direkto de

Bruselo: sekvi la aŭtoŝoseon nro 411; elirejo Corroy-le-Grand ĝis la nacia aŭtovojo Namur-Bruselo. Turni dekstren kaj veturi ĝis Louvain-la-Neuve.

– veninte de Parizo: aŭtoŝoseo nro E19 ĝis Bruselo. Sekvi la ŝoseon ĉirkaŭ Bruselo kaj sekvi la direkton Namur. (Vidu unuan vojon supre.)

– veninte el Nederlando: veturi al Antwerpen. De Antwerpen aŭtoŝoseo nro E19 al Mechelen, Bruselo, Namur. (Vidu la unuan vojon supre.)

En Louvain-la-Neuve, ŝildoj indikas la sekvendan vojon.

LA DONACO DE LOVENO
(Pri la Prahungara Maria-Plendo, trovita en Loveno)

Lirikaj kantoj kaj poemoj naskiĝis kune kun la Hungara popolo, sed dum longaj jarcentoj ili ne estis fiksitaj, garditaj per skribo. La unua konata hungarlingva poemo, la *Prahungara Maria-Plendo*, naskiĝinta ĉirkaŭ la jarcentoturno 1200-1300, konserviĝis dank' al la potenco de la literoj sur unu de la membranfajnaj paĝoj (numerita 134b) de la **Lovena Kodekso**, titolita *"Sermones"* (Preĝoj), kaj verkita komence de la XIV-a jarcento – nature, en Latina lingvo, per zorgeme kaligrafiitaj, "perloformaj" literoj. *La Plendo*, en kiu la Madono lamentas pro la morto de sia filo, estas libera traduko aŭ prefere reverko de siatempa Latinlingva poemo. Ĝi konservis la unuan, en skribo fiksitan Hungaran aliteracion, krom aliaj lirikaj kaj formaj valoroj.

Pli ol nekutima estis la sorto de la **Lovena Kodekso**, kaŝanta ĉi tiun netakseblan valoran, memoraĵon de la Hungara lingvo. En 1910 ĝi troviĝis en Italio, en la urbo Toscana, kie aĉetis ĝin JACQUES ROSENTHAL, komercisto de antikvaj libroj el Munkeno, ĉefurbo de Bavario. Dum dek du jaroj la Kodekso ne estis vendita, kaj neniu sciis, ke en ĝi

kaŝiĝis Hungara poemo. Ĝin malkovris nur post la I-a mondmilito la direktoro de la manuskriptejo de la Bavara Ŝtata Biblioteko, GEORGO LEIDINGER, kiam li faris inventaron. Nome, la Kodekso jam troviĝis en ĉi tiu biblioteko, kaj kune kun aliaj valoraĵoj ĝi devis esti transdonata kiel milita rekompenco al la mondfama universitata biblioteko de Loveno.

Dum la mondmilito la Germanoj detruis la bibliotekon kaj tial, laŭ la packontrakto, ili devis kompensi la Belgojn per samvaloraj kodeksoj kaj manuskriptoj. La menciita direktoro informis pri sia malkovro la privatan universitatan profesoron F. BABINGER, kiu konis ankaŭ la Hungaran lingvon kaj opiniis, ke la "nekomprenebla poemo" estas pra-Hungarlingva. La ĉefbibliotekisto de la Budapeŝta Nacia Muzeo veturis al Germanio por studadi kaj aŭtentigi la tekston, sed bedaŭrinde, la tiamaj aŭtoritatoj faris neniajn paŝojn por akiri la kodekson por la Hungara ŝtato kaj popolo.

Kaj sekvis la II-a mondmilito, dum kiu la Hitleraj trupoj denove detruis la bibliotekon en Loveno. Kiam proksimiĝis la fronto, la estroj kaj kunlaborantoj de la biblioteko kaŝis en ŝtalŝranko la plej grandajn valoraĵojn. Kaj jen la mirakl/o! En la konstruaĵo preskaŭ ĉio forbrulis, la meblaro, la libroj, la manuskriptoj – sed la ŝtalŝranko, kiu kaŝis ankaŭ la kodekson *"Sermones"*, restis sendifekta.

GÉZA BÁRCZI, la eminenta Hungara lingvosciencisto (ankaŭ entuziasma esperantisto) rakontis tion, ĉar la aŭtoritatoj de la nova, demokratia Hungario sendis lin al Belgio por eslplori la sorton de la *Plendo*. Tio okazis en 1947. Tiam Hungario denove estus povinta aĉeti la Kodekson sed, kiel GÉZA BÁRCZI skribis: "... ĉi tiu eblo vaniĝis pro mallertaĵoj de la Hungaroj."

La *Prahungara Maria-Plendo* devis atendi ankoraŭ pli ol tridek jaroj en la biblioteko de Loveno ĝis la jaro 1982, kiam Hungario akiris ĝin interŝanĝe de mezepoka Flandra kodekso, dank' al la fervora klopodado de pluraj sciencistoj, lingvistoj, bibliotekistoj, politikistoj, diplomatoj. La sorto de la unua Hungarlingva poemo, konservita por la

postepoko, ne estis indiferenta por la eminentuloj, gvidantoj de la kultura vivo de ĉi tiu lando, kies lingvo estas izolita en la mezo de Eŭropo, kio eĉ pli motivas la aprecon de la valoraĵoj, naskiĝintaj pratempe en ĉi tiu lingvo.

La hejmenveno de la *Prahungara Maria-plendo* estis vera, neoficiala nacia festo. La Hungaroj konsciiĝis, ke pleniĝis granda vakuo en la nacilingva kulturo. Ĉar temis pri "hejmenveno", kaj ne "hejmenreveno": la unua, skribita Hungara poemo ankoraŭ neniam estis en Hungario, en sia vera patrio. Ĝi naskiĝis en eksterlando, en Italio kaj – kontraŭ sia "volo" – dum jarcentoj ĝi kaŝiĝis en eksterlando. Nun, post pli ol ses jarcentoj, ĝiaj aventuroj finiĝis.

Pere de la Kodekso – la nomo de **Loveno** restos ĉiam alte apreciata, estimata kaj por ĉiam memorinda por ĉiu Hungaro. La interŝanĝo de neesprimeblaj kulturaj valoraĵoj inter du malgrandaj popoloj estas brila modelo de internacia kultura kunlaborado.

VHZS

SUPERRIGARDO DE LA INSTRUSISTEMO EN BELGIO

Marc DEMONTY
(instruisto pri ĝermanidaj lingvoj en mezgrada lernejo)

Antaŭ ol (re)viziti Belgion kaj partopreni fakan konferencon pri instruado tie, ŝajnas interese havi superrigardon pri la instrusistemo en la gastigota lando. Pro ĝia komplikeco kaj pro konfliktoj okazantaj ĝuste nun pri ĝia evoluo, certe ne eblos en simpla artikolo doni ĉiujn aspektojn de tiu sistemo. Mia modesta celo estos do nur prilumi kelkajn specifajn trajtojn, laŭeble plej objektive.

1. Leĝa aspekto

Ekde 1983 ĉiuj infanoj loĝantaj en Belgio devige iras al iu lernejo ekde la sesa jaro proksimume ĝis la dekoka. Dum la tri lastaj jaroj ekzistas miksitaj solvoj, ekzemple metilernado kun praktiko kaj instruado.

2. Retoj

La t.n. oficiala instruado estas organizata de la Ŝtato, la Provincoj kaj la Komunumoj. La t.n. libera instruado estas organizata de privataj personoj aŭ asocioj, ĝi estas ĉefe (sed ne nur) katolika. La provincaj kaj komunumaj lernejoj, same kiel la liberaj ricevas ŝtatajn subvenciojn kaj donas laŭleĝajn diplomojn. Laŭ la reto la terminologio varias: en la t.n. oficiala reto la lernejoj estas ĝenerale nomitaj ateneo, liceo, instituto aŭ lernejo; en la t.n. libera reto oni parolas pri kolegio, instituto aŭ lernejo.

3. Lingvoj

Laŭ la regiono, la baza lingvo por la instruado povas esti la Nederlanda (en ĉiuj unulingvaj Flandraj provincoj, en Nederlandlingva parto de Brabanto, en Bruselo kaj kelkaj komunumoj kun speciala statuso), la Franca (en ĉiuj unulingvaj Valonaj provincoj, en la franclingva parto de Brabanto – kie fakte troviĝas Louvain-la-Neuve – en Bruselo kaj same en kelkaj komunumoj), kaj la germana (en kelkaj komunumoj apud la germana landlimo).

Kiel unuan fremdlingvon, oni povas elekti en Flandrio kaj Valonio inter la Angla kaj la dua nacia lingvo (respektive la Franca aŭ la Nederlanda). En Bruselo tamen, la lernado de la dua nacia lingvo restas deviga en la mezgradaj lernejoj dum minimume du horoj semajne.

Krome eblas studi la Germanan, la Hispanan kaj la Italan, depende de la elektebleco en la lernejo. La studado de la Latina kaj Malnovgreka fariĝis pli malofta. Menciinda estas la pozicio de Esperanto, oficiale instruebla kiel libera fako en la unua ciklo de la mezlernejo,

kondiĉe ke estu sufiĉe da lernemuloj (ĝis nun ok). Tia instruado okazas i.a. en Kolegio "Notre-Dame de la Paix" apud Namuro.

4. Niveloj

Ĝenerale ekzistas kvar niveloj por la normalaj tagkursoj:

- antaŭlerneja aŭ etula lernejo dum tri jaroj (infanoj inter 2 ½-3 kaj 6 jaroj)
- elementa dum 6 jaroj (6- ĝis 12-jaraj infanoj)
- mezgrada dum 6 jaroj (12- ĝis 18-jaraj infanoj)
- supera dum 2 ĝis 7 studjaroj.

La niveloj dividiĝas en 3 cikloj de 2 jaroj en la elementa, 3 de 2 aŭ 2 de 3 en la mezgrada laŭ la tipo (vidu punkton 5).

En la supera neuniversitata nivelo ekzistas mallonga tipo (2 aŭ 3 jaroj, ekzemple por flegado), kaj longa de minimume dufoje du jaroj. En la Universitatoj oni distingas 2 aŭ 3 kandidatajn jarojn, kaj poste duan ciklon de 2 ĝis 4 jaroj por licenco aŭ doktoriĝo.

5. Du tipoj kaj kvar formoj...

En la mezgrada instruado, ekzistas t.n. renovigita instruado (ankaŭ nomita unua tipo), aplikebla diversmaniere. La ĉefa trajto estas ke nur kelkaj fakoj estas devigaj, dum eblas kombini multajn elekteblecojn. Krome la kontrolo estas malpli bazita sur ekzamenoj kaj poentoj, oni provas pli atente taksi la evoluon kaj la kapablon, kaj malpli la konojn.

En la "tradicia" instruado (dua tipo), la "menuo" estas antaŭfiksita kaj ne ŝanĝebla laŭ la elektita sekcio (Latingreka, moderna ekonomia, ktp.) La kombinado de diversaj fakoj kaj kvanto da horoj estas do malpli libera. Oni distingas 4 formojn de instruado: ĝenerala, teknika, arta kaj profesia. Tamen la unua klaso de la mezgrada lernejo estas komuna por ĉiuj en la unua tipo, la dua restas komuna por la tri unuaj formoj, por eviti tro rapidan elekton de la lernantoj.

6. Paralela kaj aldona instruado

- Socia promocio: tiuj kursoj estas organizataj ĝenerale vespere aŭ semajnfine je mezgrada aŭ supera nivelo. Dank' al sistemo de horkredito eblas je certaj kondiĉoj studi dum la laborhoroj sen salajroperdo.
- Privataj lernejoj estas kiel ĉie pli kostaj kaj ne disdonas oficialajn diplomojn.
- Eblas akiri certajn diplomojn per ekzamenado far ŝtataj ekzamenkomisionoj sen sekvi kursojn. Estas pli malfacila vojo, konsilebla nur al tiuj kiuj volas regajni perditan tempon aŭ rapidigi la studadon.
- Krome la ŝtato organizas perkorespondajn kursojn. Planoj disvolviĝas por enprogrami Esperanton.
- Profesia lernado en la entreprenoj okazas surbaze de metilernadaj kontraktoj.
- Aldoneblas ankoraŭ speciala formado en diversaj fakoj: juĝistaro, polico...
- Internulejoj pro la relative malgrandaj distancoj en la lando ne ludas ampleksan rolon.
- En Belgio funkcias tri eŭropaj lernejoj (du en Bruselo, unu en Mol), komence celitaj por la infanoj de eŭropaj funkciuloj. En tiaj lernejoj la programo pri lingvolernado estas speciale akcentita.
- Fine ekzistas kelkaj eksterlandaj lernejoj: franca, internacia, brita, germana.

Konklude videblas, ke la instrusistemo en Belgio estas varia kaj komplika. Ĝi estas ankaŭ nun unu el la ĉefaj eroj de la politika debato, i.a. pro la volo esprimita de la registaro ŝpari laŭeble plej multe en tiu sektoro.

Fonto de informoj: "Réussir sa scolarité" de Bonnet, Gayina, Lause, Vroye; eldonejo De Boeck.

SUGESTOJ DE LA VICPREZIDANTO

Post du kvaronjaroj de tre intensa, ekstere apenaŭ videbla interna laboro, la nova estraro de ILEI deziras fari tre konkretan bilancon de la nuna situacio de la asocio, kaj de la ĝenerala stato de la Esperanto-instruado en la mondo.

Pro tio, la 20a Konferenco estu konsciigo pri niaj fortoj, niaj rimedoj, niaj celoj, niaj venkoj kaj malvenkoj.

Ĝi instigu nin al nova dinamika, aktualigita alpaŝo de niaj problemoj. Ĝi reagu kontraŭ ĉiuj formoj de senkuraĝeco kaj rezignacio. Ĝi enblovu en nian membraron novan realisman batalemon kaj inspiron, novajn ideojn kaj precipe novan entreprenemon.

Estas en tiu mensostato, ke la estraro invitas ĉiujn Esperanto-instruistojn aŭ instruantojn multnombre partopreni la Konferencon kaj aktive kunlabori al la realigo de niaj celoj.

La programo prezentos plurajn aspektojn de ILEI-aktivecoj.

1. Fakajn, pedagogiajn:

organizo de kursoj kaj ekzamenoj, trejnado de instruistoj kaj instruantoj, metodologio kaj didaktiko, disponeblaj lerniloj, ktp.

2. Organizajn:

rekonsidero de nia nuna strukturo surbaze de sekciestroj, precizigo kaj disdivido de ĉies taskoj, ILEI-konferencoj (dato, loko, enhavo...), rilatoj kun UEA kaj aliaj organizaĵoj, Internacia Pedagogia Revuo, analizo de la membraro, financaj problemoj, inventarigo de la Esperanto-instruado en la mondo, la Jubilea Jaro, ktp.

3. Strategiajn:

disvastigo de Esperanto en ĉiujn pedagogiajn mediojn, pritrakto de ekzistanta ellaborita informprogramo, rilatoj kun aŭtoritatuloj, difino de celoj kaj celeroj, ekzistanta informilaro ktp.

Kroma temo de diskuto:

Lingvo, Lernejo kaj Paco, okaze de la Internacia Jaro de la Paco.

Kiel ni pasigos la vesperojn?

Sabate : neformala interkona vespero
Dimanĉe : Belgio sin prezentas (varia programo)
Lunde : vespervizito al la belega centro de Bruselo
Marde : La muziko de Liszt (1811-*1886*)
Merkrede : ekskurstago
Ĵaŭde : libera aŭ vespervizito al Leuven
Vendrede : distra, adiaŭa, kabareta vespero. Nekonataj telentoj sin anoncu!

Alvoko: ideoj, sugestoj, proponoj pri diskutindaj programeroj estas nepre bonvenaj ĉe la prezidanto aŭ la vicprezidanto.

LA DETALA PROGRAMO DE LA XXa

SABATE 12a	Alveno kaj instalado	
	16.00-18.00	estrarkunsido
	18.30-19.15	vespermanĝo
	20.00-21.00	interkona vespero
DIMANĈE 13a	9-00- 9.30	matenmanĝo
	10.00-12.00	solena inaŭguro
	13.00-14.00	tagmanĝo
	14.30-16.00	Lingvo-lernejo-paco (Szerdahelyi) diskuttemo
	18.30-19.15	vespermanĝo
	20.00-21.30	Belgio sin prezentas (varia programo)
LUNDE 14a	9.00- 9.30	matenmanĝo
	9.45-12.30	eventuale kursoj ĝenerala diskuto pri internaj organizaj problemoj de ILEI, surbaze de labordokumentoj (Symoens)
	13.00-14.00	tagmanĝo
	14.30-16.00	ĝenerala lingvo- kaj lernejpolitikaj tendencoj (Szerdahelyi); enkonduka artikolo en IPR/2.
	16.30-18.00	O. Hoekstra prezentas la novan metodon "Esplorkreiva Vojo" de d-ro Knibbeler el Nijmegen (NL)
	18.30-19.45	Vespermanĝo
	20.00-22.00	vespervizito al la centro de Bruselo
MARDE 15a	9.00- 9.30	matenmanĝo
	9.45-12.30	ĝenerala diskuto... (vidu lunde)
	13.00-14.00	tagmanĝo


	14.30-16.00	pedagogia kaj metodika preparado de Esperanto-kursgvidantoj, internacia ekzameno kaj diplomo, ktp. (Childs-Mee kaj Szanser)
	16.30-18.00	daŭrigo
	18.30-19.45	vespermanĝo
	20.00-21.30	Omaĝo al Franz Liszt
MERKREDE 16a	Tuttaga ekskurso al Gembloux (mondfama Agronomia Universitato) Namur kaj Dinant, aŭ libera tago	
ĴAŬDE 17a	9.00- 9.30	matenmanĝo
	9.45-12.30	ĝenerala diskuto pri laborplano, strategio, taktikaj problemoj, surbaze de labordokumento (Symoens)
	13.00-14.00	tagmanĝo
	14.30-16.00	Enkodigo de Esperanto kompare al aliaj lingvoj (Van Damme)
	16.30-18.00	decidota
	18.30-19.15	vespermanĝo
	20.00-22.00	libera vespero aŭ vespervizito al la Flandra Universitata urbo Loveno
VENDREDE 18a	9-00- 9.30	matenmanĝo
	9.45-12.30	komitatkunsido (estraro + sekciestroj + estroj de laborkomisionoj) (Szerdahelyi)
	13.00-14.00	Tagmanĝo
	14.30-16.00	ILEI kaj UEA: rilatoj, Tago de la Lernejo, ILEI-kunsido
	16.00-18.00	libera butikumado aŭ rezervita al neantaŭvideblaj aktivecoj, diskutoj ktp.
	18.30-19.15	vespermanĝo
	20.00-21.30	Jan Bovendeerd prezentas distran, adiaŭan, kabaretan vesperon.
SABATE 15a	9.00- 9.30	matenmanĝo
	9.45-12.00	Asembleo: konkludoj, decidoj, rezolucio, fermo
	13.00-14.00	lasta komuna tagmanĝo

Rimarkoj:

1. La programo prezentas kelkajn esencajn erojn kaj lasas lokon por lastmomentaj aranĝoj. Ni deziras ne troŝarĝi la programon por ebligi fundajn komunajn kaj liberajn sed necesajn ekster-kunsidajn diskutojn.
2. Ni firme atendas ke el la diskutoj iĝu konkretaj kaj aplikeblaj decidoj por plibonigi la funkciadon de ILEI kaj atingi kelkajn konkretajn celojn dum la venontaj jaroj.
3. Por plifaciligi kaj orientigi la diskutojn, ni preparis plurajn labordokumentojn, kiuj ne implicas la aprobon de la prezentitaj ideoj, sed alcelas nur stimulon de propra pensado kaj prezento de personaj proponoj.
4. Post la Konferenco, la membroj klare devas scii kion ILEI atendas de ili, kiuj estas la grandaj atingeblaj celoj kaj celeroj, kiuj estas la disponeblaj hom- kaj monrimedoj, kiuj estas la taskoj de ĉiuj. Ĉi-foje, iom pli da praktikaj kaj konkretaj DECIDOJ, iom malpli da teorio.

Ni ne povas elrevigi tiujn sekciojn, kiuj post multjara forlaso, realiĝis al ILEI kaj nun atendas ekagadon kaj efektivigojn, nek tiujn kiuj restis fidelaj, sed ankaŭ esperas kompletan renoviĝon.

● Prelegvojaĝo de la prezidanto de ILEI (28/03 – 7/04, 1986)



Grésillon, inter la 29a de marto kaj 2a de aprilo:

"Metodika seminario" de UFE (Union Française pour l'Espéranto). Iniciatinto kaj organizinto: RENÉE TRIOLLE – la prezidantino de UFE. Ideala medio: ĉio: loĝejo, manĝejo, prelegejo, konversaciejo – samloke. Eksterordinare grava ebleco por transformi dum kelkaj horoj la heterogenan anaron je amika kolegaro – antaŭkondiĉo de bonetosa, sukcesa kunlaboro.

Programo: 8.30 matenmanĝo, 9-10.15 kaj 10.30-12 prelegoj; 12.30 tagmanĝo; 14-17 seminario; ĝis 19.30 libertempo (promenado, ekskurso...), 19.30 vespermanĝo, 21 – kultura programo.

La 29-an sabate vespere – interkonatiĝo. Dimanĉe – prelego de EMMANUEL COMPANYS (Universitato Paris VIII-Vincennes-Saint Denis): *"La ĝenerala metodiko de la fremda-lingva instruado"*. Interesa kaj tre originala paralelo inter la lingvistikaj kaj lingvodidaktikaj



"Kelkaj atentaj ĉeestantoj en la Gresiljona seminario."

konceptoj; didaktika komparologio: interfero, transferoj. Specifaj problemoj de Francoj en la lernado de fremdaj lingvoj.

Lunde, la 31-an de marto: ISTVÁN SZERDAHELYI (Universitato ELTE, Budapest): *"Apliko de ĝeneralaj metodikaj konceptoj al la instruado de Esperanto"*. Celo kaj motivo; segmentado de lingva materialo; faktoroj difinantaj la metodon; la kvar bazaj kapabloj: rimedkaj cel-karakteraj; instrumetodaj procedoj kaj artifikoj; ekzercotipoj, eksterklasa aktiveco: aplikado kaj praktiko.

Marde: *instrupraktika seminario*, gvidata de RENÉE TRIOLLE. La problemo de Esperanto-instruistoj kaj instruantoj en la instruado de la Internacia Lingvo. Eksterordinare altnivela kaj vigla diskuto: la instruistoj montris siajn metodojn, pridemonstrilojn, modernan instruteknikon. Dum la diskuto unu post alia aperis la problemoj de la Francoj en

la instruado kaj lernado de Esperanto. La diskuto kirlis ĉirkaŭ pedagogiaj, metodikaj, soci- kaj psiko-lingvistikaj problemoj. Dank' al la vere profesia diskutgvidado de ĝisosta praktika lingvo-pedagogo, la problemoj klariĝis kaj per sperto-interŝanĝo multaj solviĝis.

Dum la posttagmezaj seminarioj la antaŭtagmezan materialon oni prilaboris kaj transmetis la teorion en la praktikon. La vesperaj kulturprogramoj – krom la malstreĉigo – kontribuis ankaŭ al la parolevoluigo. Tre interesan, aktualan kaj modernan metodon informi pri Esperanto la vastan publikan (neesperantistan) prezentis CLAUDE NOURMONT, la prezidantino de la pedagoga sekcio (GEE) – kiu bonvole akceptis provizore la Sekciestrecon de ILEI en Francio. Neforgeseblan literaturan travivaĵon ĝuis la publiko dum la prezentado de ROGER BERNARD.

Merkrede okazis la konkludoj – kiujn mi jam ne ĉeestis, ĉar matene mi forlasis Grésillon-on. Mi devas do fari mian privatan konkludon: la Grésillon-a Pedagogia Seminario estas ekzemplo kaj modelo kion devas fari kaj kiel devas labori landa asocio konkorde kun la pedagogia sekcio por altigi la nivelon de Esperanto-instruantoj kaj pere de tio, altigi la nivelon de la instruado mem. Tutcerte tiu dudeko da instruantoj alimaniere instruos la Internacian Lingvon post tiu Seminario ol antaŭe. Mi estas certa, ke ili tre volonte partoprenus ankaŭ la daŭrigon de tiu ĉi seminario!

Ljubljana, inter la 3a kaj 5a de aprilo:

Pedagoga, postdiploma, pliperfektiga kurso en la Universitato E. Kardelj. Iniciatinto kaj organizanto PETER ZLATNAR, helpantoj JANEZ ZADRAVEC kaj JANEZ JUG. Pli ol dudek pedagogoj el tri Jugoslaviaj respublikoj studas jam la duan jaron Esperanto-gramatikon, literaturon, historion kaj metodikon en la Pedagogia Akademio de la supre nomita Universitato. La unuan jaron ĉiuj finis jam per sukcesa ekzemeno (gramatiko kaj literaturo). Ĉi renkontiĝo estis la antaŭlasta en tiu ĉi jaro (la lasta okazos en majo). La lasta ekzameno

okazos aŭtune (en septembro aŭ oktobro) dume ĉiu kandidato devas verki diplom-laboraĵon. La programo de la kurso estas iom reduktita programo de la koresponda sekcio de la fako Esperanto en la Universitato ELTE/Budapeŝto kaj kongruas kun la postuloj de la Internacia Pedagoga Ekzameno de ILEI. *La programo de la renkontiĝo:*

Vendrede, la 4an de aprilo: la kursanoj partoprenis *modelan instruhoron* en la lernejo dr. Vito Kraigher. Instruis kolegino ANDJELKA SUČIĆ. Post la instruhoro en la instruista ĉambro de la lernejo la gekursanoj analizis kaj kritikis la instruhoron.

Posttagmeza programo:

- 14.30 - 16 : *Metodologio* – I. SZERDAHELYI
- 16.15 - 17.15: *Historio de Esperanto-Movado* – I. SZERDAHELYI
- 17.30 - 18.30: *Seminario pri la prelegoj* – SONJA TAVČAR

Sabate:

- 8 - 9.30: *Historio;*
- 10 - 11.30: *Metodologio* – ambaŭ SZERDAHELYI
- 11.45 - 13.15: *Seminario* – S. TAVČAR.

Tuj post la tagmanĝo mi veturis al Zagrebo, kie mi partoprenis la trian aranĝaĵon dum mia rondveturado.

Kvankam kaj en Grésillon kaj en Ljubljana okazis pedagogiaj kursoj perfektigaj, ili esence diferencas: la Franca estis pure movada, dume la Slovena okazis en la kadroj de Universitato kun duonoficiala karaktero. La franca estis nur tritaga Seminario – la Slovena estas dujara kurso. Sed la celo de ambaŭ estis la sama: perfektigo de instruistoj ĉe la Francoj plie por la plenkreskulaj kursoj, ĉe la Slovenoj – por la lernejoj. La Slovena movado estas forte lernejo-centra.

Zagrebo, inter la 5a kaj 7a de aprilo:

Internacia Scienca Simpozio – ĉi-foje la epiteto "scienca" komprenenda en sia plena senco. Kadrotemo: *"La rolo de Esperanto en la porpaca agado de la mondo"* – kontribuo al la Internacia Jaro de la Paco. La divido de la kadrotemo (subtemaro):

A. Esperanto kaj ĝiaj rilatoj al mondaj organizaĵoj;
B. Eduka valoro de Interna Ideo:
   1. Esperantistoj en militaj cirkonstancoj;
   2. Esperanto-movado kiel edukejo por plia demokratiigo en internaciaj kontaktoj.

Aranĝanta institucio: Kroatia Esperanto-Ligo kunlabore kun la Internacia Kultura Servo – afergvidanto kaj simpozi-estro: ZLATKO TIŠLJAR.

Oni malofte troviĝas en medio, kie la lingva nivelo de ĉeestantaro senescepte estas tiel alta, kiel ĉi-foje estis en Zagrebo. Tiu alta lingva nivelo ebligis vere profunde-sciencajn prelegojn kaj diskutojn. La strikte disciplinita program-gvidado ebligis la senrestan realigon de la antaŭfiksita tagordo. La prelegantaro kaj partoprenantaro estis internacia: krom la Jugoslavianoj ĉeestis gastoj el Aŭstrio, Bulgario, FR Germanio, Hungario, Italio, Svislando.

La programo:

Sabate, la 5-an: prelegoj de FLORA SZABÓ-FELSŐ, CLAUDE PIRON, JOZO MAREVIĆ, ZLATOJE MARTINOV, JOVAN ZARKOVIĆ kaj PETER ZLATNAR;

Posttagmeze: TIBOR SEKELJ, JOSIP VRANČIĆ, VESNA STANIČIĆ-BURCHARDS, VIOLIN OLJANOV.

Dimanĉe, la 6-an: HANS-MICHAEL MAITZEN, ISTVÁN SZERDAHELYI, ANTUN SIMUNIĆ kaj DJORDJE DRAGOJLOVIĆ;

Posttagmmeze: OTON PANCER, NIKOLA RAŠIC kaj ARIELA COLOMBIN – poste: findiskutoj, konkludoj.

Lunde, la 7-an: Akcepto ĉe la Ligo por Paco de Kroatio.

La Zagreba aktiveco – se oni ĝin volas koncize karakterizi – baziĝas sur science prilaborita sociologia fundamento – estu ĝi instru-eduka (kp. "Zagreba metodo"), estu ĝi pupteatra aŭ renkontiĝo de denaskaj esperantistaj infanoj, estu ĝi socipolitika, kiel la nuna simpozio.

La Zagrebanoj ĝuste rimarkis, ke la pri- kaj por-Esperanta agado ne eblas en ia socia vakuo, socia ekster-teritorieco. Bonŝance ili havas

talentajn junajn fortojn, kiuj kapablas science esplori la soci-politikajn aspektojn de Esperanto kaj enkadri ĉiujn siajn aktivecojn en tiujn kadrojn. Eble ili trovos iom pli da loko en sia estonta aktiveco ankaŭ por la pli intensa lerneja politiko.

(Cetere la materialo de la Simpozio aperos kaj Esperante, kaj Kroate.)

Resumante la spertojn de la triopo:

ĉu ekzistas iu komuna denominatoro? Mi konstatis la jenajn:

a. konscia klopodo al profesieco kaj fakeco;
b. forta deziro altigi la lingvan kaj fakan nivelon ĝenerale kaj precipe tiun de la Esperanto-instruantoj; serĉi la movadajn kaj instituciajn eblojn por ties efektivigo;
c. la ĝusta formulado de la esperantismo, kiel socia fenomeno; serĉado de nunaj kaj estontaj sociaj funkcioj de la Internacia Lingvo; la anstataŭado de sloganoj por raciaj argumentoj, la propagandon per objektiva informado – fine:
ĉ. ne eblas ne rimarki, ke malantaŭ ĉiuj ĉi iniciatoj troviĝas unuopuloj, kiuj havas eksterordinaran altir-forton, organizan kapablon, neelĉerpeblan paciencon kaj entuziasmon por efektivigi tiun celon, kiun ili mem difinis kaj kiun ili sukcesis akceptigi en sia rondo. Tiu fenomeno iĝas ĉiam pli-kaj-pli ĝenerala. Estus eraro perforte klopodi al iaspeca uniformigo – ĉar tio tutcerte fiaskus. Nur la plurismo estas akceptebla, la akcepto kaj estimo de tiuj diverstipaj, tamen konverĝaj, iniciatoj. La piramideca strukturo en volontula movado ne funkcias. Nur inteligenta kaj sobra kunordigado de tiuj diverstipaj aktivecoj estas celkonforma, kunordigado, kiu kondukas la disipitajn metiejojn al libervola kunlaborado. Ĝuste tial ILEI neniam konsideras sin ia "gvida" organizaĵo. Tre modeste sed konscie ĝi proponas siajn servojn por kunordigi tiujn aktivecojn, kiuj apartenas al ĝia kompetento.

SZ-I

▲ Kursoj de Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds (Svislando)

30a junio - 5a julio: GERARD COOL, Participaj sufiksoj en Esperanto;
7a - 12a julio: AUDREY CHILDS-MEE, Cseh-seminario grado A (enkonduka). Kunlaboranto: STEFANO KELLER. Organizanto: MILA VAN DER HORST-KOLINSKA flanke de IEI;
21a -26a julio: ISTVÁN SZERDAHELYI, Kiel Esperanto kaj ties movado kaj literaturo evoluis dum sia unua jarcento;
28a julio - 2a aŭgusto: GIORGIO SILFER, Kalevala, la grandioza epopeo norda; paralele: GEORGES LAGRANGE, Lertiĝo en la tradukarto el la Franca; DIRK WILKOMMEN, Lertiĝo en la tradukarto el la Germana;
11a - 16a aŭgusto: daŭrigo de la seminario de D. WILKOMMEN; E. BORSBOOM, Nia Esperanto-Literaturo en la lastaj jardekoj;
18a -23a aŭgusto: WIM DE SMET, internacia geografia kaj biologia feriado;
22a - 24a aŭgusto: WIM DE SMET, La nova biologia nomenklaturo.

■ 7a Pedagogia Seminario Esperantista de la Sarda Esperantista Unuiĝo

(Via Umberto I.n. 60, I-07014 OZIERI SS)
en Nuoro la 26an, 27an kaj 28an de septembro 1986
Kadrotemo: Esperanto kaj didaktika uzo de la porknaba literaturo
Prelegoj: 26a sept., G. FORMIZZI, *Naturo kaj celoj de la porknaba literaturo*;
27a sept., N. PALA, *Strukturo de Esperanto kaj ĝia didaktika uzado*;
L. TOLA, *Kongruo de Esperanto al mensaj procedoj kiuj ĉeestas lingvan ekscion.*

■ Hermann GMEINER mortis

Unu el la plej noblaj helpantoj de la forlasitaj kaj orfaj infanoj, la prezidinto-fondinto de la movado SOS-Infanvilaĝoj. Li komencis per kolektado de 1 groŝoj kaj en 1949 li fondis la unuan SOS-Infanvilaĝon en Imst, apud Innsbruck. Hodiaŭ jam ekzistas pli ol 200 tiaj vilaĝoj en 85 landoj. Ni memoru ĉi tiun lian frazon: *"Bonfaro estas tio, kion oni faras super la deviga farendaĵo."* Li estis 67-jara.

● La Mondasocio de Ĝemelurboj

naskiĝis en la Franca urbo Aix les Bains en 1957. Ĝi funkcias sub la egido de UNo. Ĉiujare la lasta dimanĉo de aprilo estas la tago de "ĝemelurboj". Dum sia 29-jara ekzisto, tiu movado sukcesis krei vere amikajn, intimajn rilatojn inter la plej diversaj nacioj. Esperanto dekomence estis forte interesata en tiu ĉi movado. Por la ILEI-Sekcioj estus tre konsilinde ekscii, ĉu ilia urbo havas ĝemelojn kaj interrilatiĝi kun la lernejoj de la ĝemelurboj. Tiaj ĝemeligoj povas multe kontribui al la interlernejaj kontaktoj!

▲ La reelektoj kaj nov-elektoj en la Akademio de Esperanto

Laŭ la Cirkulero Nr. 151/4: al la Dua Triono (rebaloto 1995) elektiĝis: BOULTON, ROSSETTI, DUC GONINAZ, MIYAMOTO, ROSBACH, XIE, CHAVES, GREGOR, EICHHOLZ, ĜUĜEV, KNOEDT, SEKELJ, SZERDAHELYI, OLJANOV, URBANOVÁ; en la Trian Trionon (rebaloto 1989): KRAUSE, THIERRY. La fakto ke la prezidanto de ILEI fariĝis membro de la Akademio de Esperanto promesas reordigon de la rilato inter la Akademio kaj la Ligo – verŝajne fruktedona por ambaŭ institucioj.

Librobreto

Ĉi-foje ni okupiĝas pri diplom-laboraĵoj: pridoktorecaj disertaĵoj kaj faklaboraĵoj. El inter ili ni povas proponi por via librobreto nur la disertaĵon de F. LO JACOMO – ĉar nur ĝi aperis multobligita. La aliaj estas manuskriptoj kaj atendas eldononton! Ĝuste tial pli detale ni prezentos la doktorecan ~~distraĵon~~ disertaĵon:

LO JACOMO, FRANÇOIS, *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'Espéranto*. Thèse pour le doctorat de troisième cycle sous la direction de M. le Professeur André Martinet, Université Paris 5, René Descartes sciences humaines, Sorbonne, 384.

La verkinto pritraktas Esperanton kiel vivantan, funkciantan lingvon, prefere de *priskriba* ol de *normiga* vidpunkto. Estante disĉiplo de MARTINET, li uzas terminojn de la skolo *"fonctionalisme"*, sed plurfoje li klopodas pri redifino, ekzemple de *balasto* ("redondance"). En la verko temas preskaŭ pri ĉio, nur la titoltemo ŝajnas iom forgesita (24 paĝoj de la ĉapitro 5 estas dediĉitaj al ĝi). Por ne-esperantistaj fakuloj la ĉap. 3 (la plej longa) verŝajne ne alportas multe da interesaĵoj (la problemoj ata/ita, alial, ktp.); por esperantistoj la ĉap. 2 (L'Espéranto, langue vivante) estas tro "balasta", kaj la konkludoj de la ĉap. 4 (Les symptômes synchroniques de l'évolution) plurfoje ŝajnas tute sendependaj de priesperantaj studoj.

La ĉap. 1., mallonga, metas nur demandojn, koncerne ĉefe la nociojn de *riĉiĝo* (enrichissement) kaj *evoluo* (évolution), malpli la rolon de *aŭtoritatoj* en la lingva evoluo; la demandoj rilatas al ĉiuj lingvoj, sed la verkinto promesas respond-provon nur en la konkreta kazo de *Esperanto*.

La ĉap. 2., post skizo de la historio de konstruitaj lingvoj, pritraktas *fonologion, sintakson* kaj *leksikon* de Esperanto. La *fonologion* li prezentas pere de minimumaj paroj ("paires minimales"), atentigante pri la problemo de *neŭtraliĝo (i)-(j)* (ekzemple [jeraŭ] anstataŭ [hi'eraŭ])

kaj ekzamenante, ĉu *c* estas *unu* aŭ *du* fonemoj. Respondon *absolute* ne eblas doni, nur atentante la atingontan *celon* kaj la *utilon* de nia vidpunkto. Koncerne *sintakson*, li montras, kiel disiĝas la *semantika* kaj *sintaksa* informo en Esperanto, kaj ke ĝuste tial necesas diferencigi *vorton* kaj *morfemon*. Li rifuzas la akademian klasifikon de radikoj, ĉar ĝi uzas *sintaksajn* terminojn por *semantika* klasifiko; laŭ li pli taŭgus paroli pri radikoj "nominales, événementelles, qualificatives". En *leksiko* li demandas sin pri la influo de naciaj lingvoj kaj atentigas pri la malaperado de diferenco inter *afiksoj* kaj *radikoj*, respektive *afiksoj* kaj *leksemoj*.

En la ĉap. 3. li difinas la *riĉiĝon* kiel rezulton de nova komunika bezono (do, ne temas pri juĝo de valoroj), *evoluon* kiel malrapidan, senĉesan, enan proceson, kiun kreas la aro de unuopaj videblaj riĉiĝoj. *Reformantoj* konsideras Esperanton ankoraŭ kiel *plan*lingvon, iliaj ŝanĝoproponoj respondas al *eksteraj*, "propagandaj" bezonoj, dum *reaktualigantoj* celas solvi la *enajn* problemojn de vivanta, parolata lingvo. *Eraro* povas signali eventualajn evoludirektojn.

Konkretaj problemoj: kiel diri *"ordinateur"* en Esperanto? Koniginte la terminologian debaton, li konkludas, ke tolereblas samtempe *pluraj* terminoj, kaj anstataŭ voĉdono decidos la *lingvouzo* mem. Pri *seksa diskriminacio*: la proponoj pri kolektiva pronomo ("zi", poste "vi" ~~"li"~~ de Pool) kaj vira sufikso (-iĉ- kaj -ab-) eble povos eniri la lingvon, sed ne laŭ kriterioj de rigora logiko: laŭ nepra *bezono*. Pri *entabeligo de ali-vortoj: alie* devus esti akceptita kun *loka*, *aliel* kun maniera senco, dum la periodo de alkutimiĝo uzeblus *aliloke* kaj *alimaniere*, respektive. (Alial, aliam kaj aliom restus verŝajne neuzataj; sed kiu vere uzas ĉial aŭ ĉiom?)

Pri *ata/ita*: detale prezentinte la batalon, li resumas jene: vera ambiguo pro malsama interpreto de ata/ita estas tiom malforta, ke la debato meritas nur priridon. Por tranĉi la gordian nodon, li proponas anstataŭ *tempismo* aŭ konsidero de *daŭro* kaj *rezulto* la (cetere, laŭ li, pli zamenhofaj) nociojn de *ago* (action) kaj *stato* (état); -at- estas pli

"événementiel", -it- pli "qualificatif". Kvankam en konkretaj kazoj lia prijuĝo ofte proksimas tiun de la itistoj, li kritikas ilian aŭtoritatecon, ilian kredon je tio, ke aŭtoritata povo estas "sine qua non" de la sukceso de Esperanto. (Li ankaŭ ne emas paroli pri "fina glora venk'", sed aktivi en la ekzistantaj cirkonstancoj, tial kontribuante al la *lingva* evoluo.)

Pri la *akuzativo*: eblas kvar vidpunktoj. *Interlingvistike*, la demando estas: ĉu *utilas* la akuzatizo? *Normeme*: ĝia uzo estas poreterne difinita, kaj, sendepende de la lingva evoluo, kia ajn devio estas *eraro*. *Priskribe*: kiu metodo prezentas optimume la lingvan realon? Ĉu oni klarigu la akuzativon kiel fleksion aŭ kiel apartan morfemon? La *dinamika*: la akuzativo estas interesa nur en la aspekto, ĉu kaj kiel ĝi evoluas.

En la ĉap. 4. Lo Jacomo klopodas prilabori apartan teorion, taŭgan por respondi al la supraj demandoj. Anstataŭ *diskretaj unuoj*, lia centra kategorio estas *balasto* (redondance), ĉar ĝi pli ebligas la studon de *evoluo*, kion celas tiu ĉi dinamika vidpunkto, kiu, ne kiel la priskribanta *sinkronismo*, strebas al kompreno de la *funkciado* de la lingvo. Ĉar evoluo estas ligita al lingvaj *eraroj*, la verkinto realigis malgrandan enketon per surbendigita teksto, enhavanta volajn (kaj nevolajn) erarojn. Tiu enketo kondukas lin al redifino de la nocio *balasto*, kiun li resumas en tri principoj: tiu de *entuteco* (globalisation) (la balasto estas *entuteca*, ne situebla en iu parto de la eldiraĵo); tiu de *ekvilibro* (la optimuman *kvanton* da balasto difinas ekvilibra punkto inter la strebo de la ricevanto per elkapti la mesaĝon kaj tiu de la parolanto por elparoli ĝin); tiu de *ekonomio* (ĉi-lasta esence identa kun la ĝisnunaj difinoj) (la dislokigon de la informhaveco – pertinence – regulas la principo de ~ tiel, ke la ricevanto ricevu maksimumon da informoj per minimumo da strebo). Fine li konstatas, ke *priskribaj* kaj *klarigaj* lingvoteorioj havas la saman vivrajton, ĉar ili celas apartajn – kvankam ligitajn – terenojn de la lingva realo.

La ĉap.5., (la plej konkreta) analizas la nocion de *povo*, kiu estante kontraŭa al la esenco de Esperanto (dudirekta, samrajta komunikado) nepre anstataŭigendas per tiu de *konsilo*. Certaj instancoj – proponas Lo Jacomo – (ekzemple CEDI) okupu sin pri ekzameno de la vivanta lingvo kaj, surbaze de ties rezultoj, aliaj donu *konsilojn* (ne *ordonojn*!) en kazo de neceso. Por tio li faras konkretan, detalan proponon.

Frazo el la *konkludo* trafe resumas la starpunkton de la verkinto: "L'espéranto, c'est ce qu'on en fait."

István ERTL
2-a-jara studento pri
Latina-Franca-Esperanto lingvoj
Universitato ELTE-Budapeŝto

1985

– PALLA, GIOVANNI – *Raffronto tra alcuni aspetti delle lingue Inglese e Esperanto nel ruolo di "lingua ausiliare internazionale"*. Tesi di laurea, Università degli studi di Cagliari, Facoltà di magistero, Anno Accademico 1984-85.
Enhavo: enkonduko pĝ. 2-10, fonologiaj aspektoj pĝ. 11-34, Morfologiaj kaj sintaksaj aspektoj pĝ. 35-76, La lingvo, kiel rimedo de belletra tradukado pĝ. 84-88, Konkludoj pĝ. 88-93, Bibliografio pĝ. 94-117.

Koncize, klare kaj originale analizata konfronta problemaro de Esperanto kompare kun la Angla.

PÁVA, JÓZSEF – *La semantika kampo de la verbo "teni" kompare kun ĝiaj Hungara kaj Franca ekvivalentoj*. Universitato ELTE, Budapeŝto. Ĉ. 250-paĝa ampleksa laboraĵo, ne sufiĉe profunda, iom supraĵa kaj kun relative malmultaj originalaj pensoj. Valora plie per ĝia amplekso ol per ĝia enhavo.

Diplom-laboraĵoj, lerno-jaro 1985/86:

Universitato ELTE/Budapeŝto:

PAP ZSUZSANNA, *La antonimoj en logiko kaj en Esperanto.*
Enhavo: Enkonduko; Neado en Filozofio; Logiko kaj lingvo; Antonimio: difinoj kaj tipoj; Analizo kaj klasifiko de Esperantaj antonimoj; Tipoj de Esperantaj antonimoj; Lingvaj rimedoj por esprimi la antonimojn en Esperanto; La neologisma problemo.

Eble ĝis nun la plej klara priskribo de antonimia problemo en Esperanto paralele kun ĝia filozofia/logika fono, kiu iom klarigas ankaŭ la senfruktan kaj superfluan diskuton super la prefikso *mal-*.

VARGA KATALIN, *Frazeologio en arta lingvo.*
Enhavo: La frazeologio kiel lingvistika problemo. Frazeologio kaj folkloro. Fontoj kaj temoj de frazeologiaĵoj. Frazeologio kaj belliteraturo. La Esperanta frazeologio – ĉefaj fontoj: Proverbaro de Zamenhof; Domfabriko de Kalocsay/Csiszár, Penseroj de Salo Grenkamp/Kronfeld. Frazeologio en beletristiko: en la verkoj de J. Baghy kaj C. Rossetti, Kredu min sinjorino. Frazeologio en tradukaĵoj: Kataluna – Adria' Gual, Mistero de Doloro, F. Pujula y Valles, Arthur Azevedo, "Amor por Anexis" ("Amo por proverboj" trad. Fernando Domingues Couto). Citaĵo el la konkludo: "La vivo de la Esperanta frazeologio dependas jam ne de la lingvo, sed de ĝiaj uzantoj. La konstantaj elementoj funkcias kaj rigidiĝas nur tiam, se ekzistas uzantaro. Mem la lingvo povis atingi dum cent jaroj tian nivelon pere de multflanka uzado, ke ĝi tute taŭgas por frazeologio."

SZOLNOK PÉTER, *Problemoj de lingvaj baroj en la scienca kaj teknika evoluado.*

La kandidato faris la statistikon de la lingvoj, uzataj en la bibliografioj de Hungaraj lingvistikaj artikoloj kaj komparis ilin kun la indicoj,

mezurataj de Ernesto Zierer en la Nacia Universitato Trujillo (Peruo). Jen la fina rezulto:

Peruaj verkoj		Hungaraj verkoj	
la lingvoj de cititaj verkoj			
Angla	43,2 %	Angla	50,60 %
Germana	38,8 %	Hungara	27,78 % (gepatra l.)
Rusa	9,1 %	Germana	9,04 %
Franca	6,2 %	Franca	5,87 %
Itala	2,2 %	Rusa	4,67 %
Hispana	0,5 % (gepatra l.)	Ceteraj	1,84 %

Ĉe la Hungaraj verkoj inter la "ceteraj" estas la jenaj lingvoj: Hispana, Itala, Persa, Ĉeĥa, Pola, Sveda, Finna, Dana, Portugala).

Estas rimarkeble, ke ĉe ambaŭ la Angla okupas la unuan lokon, ĉe Hungaroj la gepatra lingvo estas la dua, dume ĉe Hispanoj la lasta, ĉe Hungaroj la diasporo de la lingvoj estas multe pli granda.

Universitato E. Kardelj, Ljubljana (Jugoslavio):
ĜORĜEVIĆ, SLOBODANKA, Nomina agentis en Esperanto kompare kun la Angla, Araba, Rusa, Serbokroata kaj Turka lingvoj.

Verŝajne neniam ĝis nun oni faris tiel vast-skalan komparon de iu lingva fenomeno (la nomo de agentoj) en Esperanto kun aliaj lingvoj. Ĉi-okaze gravas ne tiom la nombro de la lingvoj, kiom la diverseco de la komparataj lingvoj. La laboraĵo estas vere unika en sia speco.
Rimarko: la temo-gvidanto kaj recenzanto de ĉiuj laboraĵoj estis ISTVÁN SZERDAHELYI.

ALVOKOJ

GERMAIN PIRLOT, Kemmelbergstraat 5/b.3, B-8400 Oostende, Belgio, kompiladas informojn pri la leĝa situacio de Esperanto en la lernejoj (elementaj, mezgradaj, superaj) kaj ĉefe pri ĝia *oficiala* instruado en universitatoj kaj superaj institutoj.

Se vi povas helpi iamaniere, kontaktu lin kaj/aŭ instigu kursgvidant(in)ojn de *oficialaj* Esperanto-kursoj je supera instruado, por ke ili informu S-ron Pirlot.

Tiu alvoko ĉiam validas. Antaŭdankon pro via kunlaborado.

Aleksandro S. MELNIKOV (SU-344007, Rostov-Don 7, p.k. 393, USSR) laboras pri disertacio "Interlingvistikaj konceptoj ekde 1945", serĉas ajnajn materialojn (librojn, artikol(ar)ojn, periodaĵojn, bibliografiaĵojn, informojn ktp.) pri la konceptoj rilate al la esenco, objekto, metodo ks de interlingvistiko, ĝiaj ligoj kun aliaj lingvistikaj kaj sociaj sciencoj; nuntempaj konceptoj pri la struktura tipo de IL, ĝiaj karakteroj (principe traktendas ĉiuj lingvoprojektoj ekde 1945); nacia lingvo kiel la monda; universala-tutmonda-helpa (plan)lingvo. Rekompenco laŭ interkonsento.

EDWARD SYMOENS, Putsesteenweg 131/2, B-2180 Kalmthout, kompiladas informojn pri universitataj aŭ altlernejaj tezoj, disertacioj aŭ diplomverkoj rilate al Esperanto, interlingvistiko, la internacia lingvoproblemaro k.s.

Bezonataj informoj: nomo kaj adreso de la verkinto, titolo de la verko, Universitato aŭ Altlernejo en kiu la diplomo estas akirita, eventuale la fonto de la informo (revuo, rekta informo ktp.).

KONKURSO

proponita de AEI (Aŭstria Esperanto-Instituto), A-1150 Wien, Fünfhausg. 16

Temo A: Traduko en Esperanton de tekstlibro de du famaj operoj interkonsente kun nacia aŭ internacia gvida muzika instanco. Povas esti elektitaj ankaŭ verkoj pli malgrandaj, kiel eble "La ruza vulpeto" de Janaĉek aŭ iu de Haydn aŭ Mozart.

Temo B: Verkado de Germana kaj (aŭ) interkonsente Esperantlingva tekstlibro de la komedio de Hofmannsthal: Der Unbestechliche (La nekoruptebla servisto).

Prezoj: Por la plej bonaj tekstlibroj (du el temo A kaj du akordiĝantaj el temo B) AEI dediĉas el mecenata donaco po 10 000,– Aŭstriajn ŝilingojn, do entute 40 000,– ŝilingojn.

Limdato: 31 januaro 1987

Kondiĉo: Du ekzempleroj de la laboro estu senditaj al AEI (A-1150 Wien, Fünfhausg. 16) kaj aldonita la komentario de la muzika instanco (en Esperanto aŭ Germana traduko).

Rimarko: Dezirinde, ke la kandidatoj jam frue anoncas sian intencon partopreni, ke ni povas helpi en la kunordigo. ("Der Unbestechliche" – Fischer-Taschenbuch 780 ISBN 3 596 27016 2).

Wien, en majo 1986.

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Szerdahelyi István, Universitato ELTE/BTK, H-1364 Budapest, Pf. 107
Vicprezidanto : Symoens Edward, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout)
Sekretario : Dazzini Catina, Casella Postale 22, I-54100 Massa
Vicsekretario : Bâcev Marin, BG-1000 Sofio, Pf. 1054
Kasisto : Andreasson Bertil, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby

HONORAJ MEMBROJ

Zlatnar Peter (YU) Dazzini Mario (I)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo : Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgujo : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout.
Brazilio : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britujo : ĉe E.T.A., Kinburn House, Egham Hill, Egham, Surrey TW 20 0BD
Ĉinujo : Zhang Danchen Huazhong, Normala Universitato, Hubei, Wuhan
Danujo : Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo : Pentti Järvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim (provizore)
F.R. Germanujo: Sonnabend Ruff Karin, Rodeweg 8, D-3155 Edemissen
Grekujo : K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, Strato Pyrou 28, GR-11635 Ateno
Hispanujo : Manuel López Hernández Mata, 21, 2° izq. 41.002 Sevilla
Hungarujo: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : Josef Murĵan, P.K. 1289, IL-61012 Tel Aviv
Italujo : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Portorož
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Arthur Eikenberry, 621 Aurora Ave., Santa Barbara, CA 93109, USA
Norvegujo : Rolf Anda, N-4343 Orre
Pollando : Irena Szanzer, Lewartowskiego 9 m. 17, PL-00 185 Warszawa
Portugalio : Alexander Kasesa, Calç° Duque Lafoes 26, 2° p., P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 Republica di San Marino
Sud-Afriko : Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen
Sudakoreujo : So Gil Su - Sodemun, P.K. 59, Seŭlo 120
Svedujo : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby
Svisujo : Edgar Jobin, F.-W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris
Reprezentanto de ILEI: Fairbank James, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016

FIMEM : Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 35 Avenue Jottrand, B-1030 Bruxelles

ICEM : Institut Coopératif de l'Ecole Moderne, Le Pallet, F-44330 Vallet

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

SAT : Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris

EC : Esperanto Centro, Pf. 1450, D-4790 Paderborn

EEC : Eŭropa Esperanto Centro, Schotlandstraat 73, B-1060 Brussel

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

IKS : Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

KSM : Koresponda Servo Mondskala, "Les Hortensias", 121 bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice

Kontribuajoj al IPR

sendendaj en du ekzempleroj, tajpitaj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby (Svedujo).

2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — ILEI 2814 — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)

ĜIS REVIDO EN LOVENO